# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

11

1974







Feliĉa Fonto (*ĉinstila pentraĵo*)

FANG MING:

# Miliono da nudpiedaj kuracistoj en kreskado

SUB la direkto de la proleta higiena linio de Prezidanto Maŭ, senĉese kreskas la vicaro de nudpiedaj kuracistoj en la kamparo de nia lando. Tiaj kuracistoj aktivadas en la vasta kamparo tra la tuta lando kaj servas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili faris gravan kontribuon por ŝanĝi la staton de manko de kuracado kaj medikamentoj en nia kamparo, garantii sanon de komunumanoj, akceli la agrikulturan produkton kaj puŝi la higienan revolucion de la proletaro.

"Nudpieda kuracisto" estas intima nomo donita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al kamparano-kuracisto, kiu faras kuracan servon, ne apartigante sin de kolektivaj produktaj laboroj, kaj same kiel kampara koopera kuracado, estas nova afero aperinta en la kamparo de Ĉinio dum la Granda Proleta Kultura Revolucio. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"**, la higienaj fakoj de diversaj lokoj elkulturis por produktaj brigadoj grandan nombron da nudpiedaj kuracistoj en la kultura revolucio. En septembro de 1968, la gazeto *Hongqi* publikis enketan raporton kun grava noto de Prezidanto Maŭ "Pri la Direkto de Medicina Eduka Revolucio en Kreskado de Nudpiedaj Kuracistoj", kaj per tio donas grandan subtenon al la nova afero.

De la lastaj kelkaj jaroj, la nombro de la nudpiedaj kuracistoj en produktaj brigadoj de la tuta lando jam atingis pli ol milionon kaj tiu de la produktgrupaj sani-

*Nudpiedaj kuracistoj faras injekton por infanoj.*





*Nudpieda kuracistino kuracas komunumanon en kampo.*

taristoj pli ol tri milionojn. La produktaj brigadoj de la popolkomunumoj en la dek gubernioj en la antaŭurbo de Ŝanhajo jam efektivigis la kooperan kuracadon kaj pli ol 8,600 nudpiedaj kuracistoj vigle laboras tie. Pli ol 90 pocentoj el la brigadoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino jam starigis kooperan kuracan stacion, kaj ĉiu brigado havas meznombre 3 nudpiedajn kuracistojn. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, la vasta montoza kamparo en Hinhian, Ŝanhi-provinco havis nur pli ol 1,100 medicinajn laborantojn, plejparto el kiuj servis en la guberniaj kaj komunumaj hospitaloj kaj kuracejoj. Nun la nombro de la nudpiedaj kuracistoj de la tuta regiono jam kreskas ĝis pli ol 6,500, t.e. 6-oblo de tiu de la antaŭaj kuracistoj. Tie pli ol 90 pocentoj de la brigadoj havas sian kooperan kuracan stacion. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, en Huaĉi-gubernio de Gansu-provinco, nur dek brigadoj starigis sanitaran stacion, sed nun ĉiu brigado funkciigis sian kooperan kuracejon, kiu havas meznombre iom pli ol 2 nudpiedajn kuracistojn. Krome ĉiu produkta grupo havas sian sanitariston. La organizoj de la Partio, medicina kaj higiena fakoj de diversaj niveloj kaj kuracaj unuoj de ĈPLA donas grandan subtenon al la nova afero. Multaj hospitaloj kaj medicinaj institutoj funkciigis kursojn por kulturi nudpiedajn kuracistojn. Urbaj medicinaj laborantoj rondirantaj en la kamparo kaj kuracaj taĉmentoj de ĈPLA fervore helpis nudpiedajn kuracistojn por altigi ilian kuracarton.

Ĉiam pli kreskantaj nudpiedaj kuracistoj montras sin kiel viglan forton en la higiena revolucio de la kamparo. La vastaj amasoj de la kuracistoj firme plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ke oni devas preni malsanan preventon kiel la ĉefan punkton, kombini la ĉinan kaj okcidentan medicinojn kaj entrepreni ĉiun aferon en diligenteco kaj ŝparemo. Kaj kune kun la sanitaristoj ili aktive konigis al kamparanoj higienan scion kaj disvolvis la amasan patriotan higienan movadon por eliminado de fiinsektoj kaj redukto de malsanoj. Ekzemple, ili helpis lokanojn en zorgado de akvofontoj, racia aranĝado de sterkejoj, reformado de putoj, necesejoj, staloj, kuirejoj kaj plibonigo de aliaj higienaj kondiĉoj. Ili propagandis laŭplanan infano-naskon kaj faris sanprotekton al infanoj kaj virinoj. Por bone fari kooperan kuracon, la nudpiedaj kuracistoj mobilizis amasojn por mem kulturi, kolekti kaj prilabori drogherbojn, kaj fervore donis kurachelpon al la amasoj, tiel ke multe boniĝis la medicina kaj higiena kondiĉoj en la kamparo. En 1973, la nombro de homoj, kiuj ricevis kurachelpon de la nudpiedaj kuracistoj de la gubernio Jiŝan de Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono estas 3-oblo de la totala nombro de pacientoj kuracitaj de ĉiuj komunumaj

kuracejoj de la gubernio. La ordinaraj malsanoj povas esti ĝustatempe kuracataj ĉeloke. Antaŭe, en la regiono de Jangĝoŭ de Giangsu-provinco cirkulis skistosomozo. La nudpiedaj kuracistoj prenis diversajn metodojn por preventi la malsanon, kio malplimultigis la malsanulojn je 88.4% en la kvar jaroj post 1970, efike garantiis la sanon de la vastaj amasoj kaj akcelis la agrikulturan produkton.


La nudpiedaj kuracistoj de diversaj lokoj ĝenerale estis elektitaj el la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj el intelektaj junuloj venintaj de la urboj al la kamparo. Kvankam ili ne havas multajn legosciojn, tamen ili havas profundan amon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj bone konas la lokan vivon. Post kiam ili unuapaŝe posedis la higienan kaj medicinan sciojn kaj teknikon, ili povas senĉese altigi sian kuracarton dank' al diligenta studo en praktikado. Sin ekzercante en kuracado de kelkaj jaroj, nun la nudpiedaj kuracistoj jam povas kuraci kaj preventi oftajn kaj ripetemajn malsanojn, aplikante la metodojn de ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Iuj eĉ povas kuraci maloftajn malsanojn. Vang Mingŝeng, la komunumano de Hinĝaj-komunumo de Linkju-gubernio de Ŝandong-provinco, suferis de reŭmatisma artrito kaj paraliziĝis sep jarojn. Li dufoje vizitis alilokajn hospitalojn, sed ne ricevis kuracan efikecon. Poste la brigadaj kuracistoj Doŭ Ĉangmin kaj Hia Zengmej faris al li akupunkturon je pli ol 500 fojoj, kaj samtempe masaĝis kaj kuracis lin per ĉinaj medikamentoj. Dank' al tio li fine restariĝis kaj antaŭnelonge eĉ partoprenis en la somera rikolto.

La nudpiedaj kuracistoj ne nur ludas grandan rolon en la kamparo, sed ankaŭ donas ĉiam pli grandan influon al la higiena revolucio kaj medicina eduka revolucio. De la jaro 1970, nemalmultaj spertaj nudpiedaj kuracistoj estis elektitaj en medicinajn institutojn kaj kolegiojn por lerni kaj partoprenis en la medicina eduka revolucio. La Ŝanhaja Instituto de Ĉina Medicino, la Ŝanhaja Unua Medicina Instituto kaj la Ŝanhaja Dua Medicina Instituto sendis siajn studentojn al la kamparo por lerni en praktiko. Donante al la studentoj lekcion pri prevento kaj kuracado de skistosomozo, unue la nudpiedaj kuracistoj de Lianti-brigado de Silian-komunumo de Songgiang-gubernio petis tieajn malriĉkamparanojn kaj

*Nudpieda kuracisto Su Ĉenghi (maldekstre) en Ninghia kune kun aliaj komunumanoj prilaboras la de ili mem kultivitajn drogherbojn.*



*Li-nacia nudpieda kuracistino Huang Hiuhiang faras preventan injekton al lernantoj de Ŝilong-brigado en Baŭting-gubernio de Guangdong.*



malsuperajn mezkamparanojn suferintajn skistosomozon en la malnova socio rakonti al ili sian tragedian travivaĵon, kaj poste klarigis la kaŭzon de tiu malsano kaj kuracmetodojn, tiel ke la studentoj ne nur ellernis fakajn sciojn, sed ankaŭ ricevis profundan edukon pri la klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Profitante okazojn de lernado en hospitalo aŭ akompanadon de gravaj malsanuloj al hospitalo, la nudpiedaj kuracistoj ofte transdonas al la hospitalo opiniojn, postulojn kaj esperojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tio akcelis la higienan revolucion de hospitalo en diversaj flankoj.

En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj amasoj de la nudpiedaj kuracistoj kune kun la tutlanda popolo senkompate kritikas la kontraŭrevoluciajn krimojn de Lin Biaŭ pri restaŭro de kapitalismo kaj kalumnioj al la nudpiedaj kuracistoj kaj koopera kuraco per multaj elokventaj faktoj. Tio plialtigis ilian memkonscion en plenumo de la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ. Hardite en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la batalo de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj amasoj de la nudpiedaj kuracistoj senĉese altigis sian konscion en ideologio kaj politiko, kaj aperis inter ili multaj avangarduloj. Nun la nudpiedaj kuracistoj sub la gvido de diversnivelaj organizoj de la Partio profunde disvolvas la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj persistas en partopreno en kolektiva produkta laboro, ĉiam tenas la bonan kvaliton de laboranta popolo kaj tutanime servas al la popolo; samtempe la partiaj organizoj laŭplane altigas ilian kuracan teknikon, por ke ili faru pli grandan kontribuon en disvolvo de higiena revolucio en la kamparo, plenumo de la tasko elmetita de la Centra Komitato de la Partio kaj kreado de novaj medicino kaj farmacio de nia lando.

# La naskiĝloko de nudpiedaj kuracistoj

EN la antaŭurba gubernio Ĉuanŝa de Ŝanhajo troviĝas iu komunumo nomata Gianggêen. Vang Gujĝen de tiu komunumo estis sendita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al iu hospitalo por tie lerni kuracarton. Post la reveno de la lernado, ŝi partoprenas kiel kamparano en la kolektiva laboro kaj samtempe faras kuracan servadon. Komunumanoj gloris ŝin per la titolo "nudpieda kuracistino", kaj de tiam la nomo estas vaste uzata en nia tuta kamparo.

Antaŭ la granda kultura revolucio, la komunumo havis nur unu hospitalon kun dekkelkaj medicinaj laborantoj, kiuj prenis sur sin la pezan taskon preventi malsanojn kaj fari kuracadon por 28,000 personoj de la komunumo. Influite de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, ili atendis pacientojn en la hospitalo kaj tio alportis multajn ĝenojn al la komunumanoj en kuracado. En la granda kultura revolucio la ŝanhajaj medicinaj laborantoj venis al Gianggêen-komunumo por servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj

mezkamparanoj, plenumante la instrukcion de Prezidanto Maŭ Zedong, ke la kuraca kaj higiena laboro devas sin direkti al la kamparo. La komunumaj gvidantoj petis, ke la medicinaj laborantoj fondu ankoraŭ medicinan kurson por nombro da junaj kamparanoj por ke la lastaj fariĝu kuracistoj tie servantaj. Jen aperis en la komunumo la unuaj 28 nudpiedaj kuracistoj, kaj nun ĝi jam havas 71 tiajn kuracistojn.

Nudpiedaj kuracistoj estas elektitaj de la komunumanoj kaj plejparto de ili estas gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun klereco de elementa aŭ meza lernejo. Post mallongtempa trejnado ili denove revenas al sia brigado. Kun medikamenta kesto ili laboras sur draŝejo kaj kampoj, kaj samtempe donas kurachelpon al komunumanoj. La tempo de ilia fizika laboro estas triono de tiu de komunumano. Ili akiras rekompencon ankaŭ laŭ laborpoentoj kaj por ilia kuracado la brigado donas taŭgan krompagon, tiel ke ilia enspezo tenas saman nivelon kun tiu de same laborkapabla komunumano.

Dank' al praktikado kaj trejnado de pluraj jaroj, plejmulto de la nudpiedaj kuracistoj de Gianggên-komunumo povas lerte apliki metodojn de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kuracado de oftaj malsanoj en la kamparo. Iuj el ili eĉ povas kuraci pacientojn kun malfacile kuracebla malsano kaj savi malsanulojn el danĝero, kaj nemalmultaj nudpiedaj kuracistinoj povas fari akuŝigon kaj fekundig-imunan operacion.

Vang Gujĝen, la unua nudpieda kuracistino de la komunumo, jam fariĝis vicsekretario de ĝia partia komitato kaj respondecas pri ĝia kuraca kaj higiena laboro. Samtempe ŝi ankoraŭ servas kiel nudpieda kuracisto. Trionon de la jaro ŝi laboras sur kampoj kune kun komunumanoj kaj faras al ili kuracadon kaj propagandon pri higienaj scioj en laborpaŭzo; la duan trionon ŝi faras kuracadon rondire inter vilaĝoj; kaj la lastan trionon ŝi deĵoras en la brigada kuracejo. En la pasintaj naŭ jaroj, dank' al sia praktiko kaj lernado en diversaj mallongtempaj kursoj, ŝi jam povas apliki pli ol 200 specojn de drogherboj kaj ĉ. cent receptojn por kuraci diversajn malsanojn per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino.

Kial ŝi volas esti nudpieda kuracisto? Pri tio ŝi diris: "La kamparanaro okupas 80% de la tuta loĝantaro de Ĉinio. Por solvi la kuracan kaj higienan problemon de sescent milionoj da kamparanoj, necesas ne nur la profesiaj medicinaj laborantoj, sed ankaŭ la nudpiedaj kuracistoj el la kamparanoj. Ĉar la lastaj vivas en la kamparo kaj bone konas la bezonojn de kamparanoj. En la komenco nia kuracarto estas malalta, sed ĝi altiĝas iom post iom post praktiko kaj lernado. Pli grave estas, ke ni prenas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel niajn parencojn kaj volas servi al ili tutkore kaj tutanime."

Nun la nudpiedaj kuracistoj ludas rolon de ĉefa forto por plibonigi la kuracan kaj higienan staton de la kamparo. Aplikante la principon pri prevento de malsanoj kiel la ĉefa metodo, ili kune kun sanitaristoj de la produktaj grupoj mobilizis la amasojn por

*Vang Gujĝen (meze) faras akupunkturon.*



energie ekstermi fiinsektojn kaj plibonigi la higienajn kondiĉojn. Dank' al tio, en la lastaj jaroj, reduktiĝis jaron post jaro la pocento de oftaj kaj infektaj malsanoj, kio multe favoras al la sano de komunumanoj kaj akcelis la disvolviĝon de la agrikultura produkto.

Dangoŭ-brigado de Gianggên-komunumo havas kvar nudpiedajn kuracistojn, kiuj zorgas pri epidemipreventa kaj sanitara laboro de la brigado kun 1,600 personoj. Veninte al kampoj, domoj kaj lernejoj kaj per murgazeto kaj brodkasto, ili propagandas al la amasoj higienajn sciojn malsanopreventajn kaj havigis al ili kutimon vivi higiene. La membroj de la brigado, de infanoj ĝis maljunuloj, ĉiuj havas dosieran karton pri sia sanstato kaj estas inokulitaj periode por preventi malsanojn, kaj krome unu nudpieda kuracisto estas asignita por zorgi pri sano de virinoj kaj infanoj. La staloj kaj bredejoj de porkoj, bovoj, ŝafoj, kokoj, kunikloj kaj aliaj bestoj estas purigitaj kaj steriligitaj periode, tiel ke la vilaĝo ekhavis novan fizionomion.

La nudpiedaj kuracistoj tre atentas ŝparon de elspezo en kuracado kaj faras ĉion eblan por malpliigi la elspezon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, tiel ke la koopera kuraca fonduso de la plejmulto de brigadoj havas reston ĉiujare. Per tio ili faris kontribuon en firmigo kaj disvolvo de koopera kuracado.

La nudpiedaj kuracistoj de Hongki-brigado de Gianggên-komunumo persiste partoprenas en kamplaboro kaj samtempe tutkore faras kuracan servon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉiujare ili laboras pli ol 100 tagojn. En la pasinta jaro, ili partoprenis en somera laboro, timante nek penon nek lacon. Iutage, ili faris rizidtransplantadon. Sed, ĝis vespera krepuskiĝo, ankoraŭ restis malgranda peco da kampo netransplantita. Estro de produkta grupo ordonis komunumanojn ĉesigi la laboron pro ilia laciĝo. Sed nudpieda kuracistino Ju Lindi iniciate petis permeson fini la plantadon kune kun kelkaj komunumanoj.



*Vang Gujĝen sur kampo*

Ili rigardas suferojn de komunumanoj kiel la siajn. La infano de komunumanino Ĝoŭ Gujhian suferis akutan malsanon, kaj Ju Lindi tuj rapidis por savi kaj regi graviĝon de la malsano. Tuj poste ŝi portis la infanon al la komunuma hospitalo kune kun Ĝoŭ Gujhian. Kiam la infano devis esti sendita al la gubernia hospitalo, Ĝoŭ Gujhian ne havis sufiĉe da mono. Tiam Ju Lindi elpoŝigis sian monon, kaj Ĝoŭ Gujhian kortuŝite diris: "Lindi, vi vere estas nia propra kuracistino!"

La nudpiedaj kuracistoj de Gianggên-komunumo jam formis sian bonan tradicion en multjara servado al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ju Lindi resume diris: "Ni portas dikajn kalojn sur la manoj kaj koton sur la piedoj, kaj ĉiam tenas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en la koro."

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong, fortike kreskas la kuraca vicaro de kamparanoj.

# Nudpieda Kuracistino en Altlernejo

Nudpieda kuracistino Sun Julan, kiu kreskis en la Granda Proleta Kultura Revolucio, estas nun studentino de la Ŝandong-a Medicina Instituto.

Ŝi estas filino de kamparano kaj en 1967 komencis funkcii kiel nudpieda kuracistino de Suncun-brigado de Janĝoŭ-gubernio, Ŝandong-provinco. En pli ol kvar jaroj ŝi entuziasme servis al la kamparanoj, resanigis multajn pacientojn per akupunkturo kaj multfoje savis malfacile akuŝantajn virinojn el danĝero.

En la jaro 1971, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Suncun sendis ŝin al la Ŝandong-a Medicina Instituto por lerni. En la instituto ŝi aktive partoprenas en la eduka revolucio, tenas en si bonan kvaliton de la laboranta popolo pri penema lukto kontraŭ malfaciloj kaj diligente studas profesiajn sciojn.

Sun Julan (la tria de maldekstre) faras klinikan praktikon sub helpo de profesoro.





Kritiko kontraŭ la reakcia tezo distrumpetita de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri "superuloj — saĝaj kaj malsuperuloj — stultaj"



Legi ĵurnalon por pacientoj.

Partopreni en kolektiva produkta laboro



Helpi al lokaj kuracistoj levi kuracan arton.





Eksperimento pri patologio

# Nudpiedaj kuracistoj bonvenaj al la amasoj

### TIBETANA NUDPIEDA KURACISTINO KJONGLA

Ĉiutage tibetana knabino Kjongla kun granda fervoro kuracas tibetanajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Ekmemorante la amaran pasintecon, kiam miliono da servutuloj ne havis siajn proprajn kuracistojn por sin kuraci, ŝi brulis de indigno.

La membroj de la familio de Kjongla en pluraj generacioj estis sklavoj de mastrosinjoroj. En iu jaro antaŭ la demokratia reformo, ĉiuj el ŝia familio suferis de variolo. Ili eĉ ne havis manĝaĵon por sin satigi por ne paroli pri vizito al kuracisto. Krome, kiu volontis kuraci ilin eĉ se ili havus monon? Oni povis fari nenion alian ol lasi la malsanon forrabi la vivon de ŝiaj sep karuloj.

La damninda malnova socio semis malamon en la koro de juna Kjongla. Post la demokratia reformo Kjongla senkompare amas la novan socion kaj pensis, ke ankaŭ la liberigitaj servutuloj devas havi siajn proprajn kuracistojn. Ŝajne la supera partia organizo travidis la ideon de Kjongla kaj sendis ŝin al medicina kurso por lerni en novembro de 1965. La afero ĝojigis ŝin tiel, ke ŝi ne povis endormiĝi en pluraj noktoj.

En la kurso Kjongla lernis verkojn de Prezidanto Maŭ, legoscion kaj kuracan teknikon. Ŝi neniam vizitis lernejon, tamen ŝi montris obstinan volon en lernado kaj nur per iom pli ol unu jaro jam posedis fundamentan teknikon de kuraco kaj prevento de oftaj, ripetemaj kaj kelkaj malfacile kuraceblaj malsanoj.

En somero de 1972, kamarado Ciĵen de Su-a produkta brigado grave malsaniĝis, pri kio informiĝis Kjongla jam en la nokto. Malgraŭ malfacila vojo trans altaj montoj, ŝi ekprenis la medikamentan keston, iris 30 kilometrojn kaj atingis la cellokon je frua mateno de la sekvanta tago. Ciĵen suferis de akuta pulmito kaj troviĝis en danĝero. Ŝi tuj injektis kaj prenigis al li medikamenton, kaj dank' al ŝia zorgema flegado dum kvar tagnoktoj la paciento eldanĝeriĝis.

En julio de 1973, artrito denove atakis maljunan onklinon Modakjong. Ŝiaj genuoj ruĝiĝis de inflamo kaj tiel doloregis al ŝi, ke ŝi eĉ ne povis piediri. Kjongla iniciate venis al ŝia hejmo por ŝin kuraci. Kuracado per medikamento ne efikis sur ŝi, Kjongla do decidis fari al ŝi akupunkturon. Post duonmonato de kuracado la onklino jam povis ellitiĝi kaj piediri. Kun larmoj en la okuloj la onklino premis la manon de Kjongla kaj diris: "Bona knabino, vi multe laciĝis en pli ol unu monato por min resanigi. Multajn dankojn!" Kjongla tuj intermetis: "Onklino, vi devas danki la KomparTion kaj Prezidanton Maŭ. Se ne estus ili, ni eĉ ne havus personan liberecon por ne paroli pri ricevo de kurachelpo."

### FILO DE LA LABORANTA POPOLO

Estis la 30-a de la lasta monato, 1972, laŭ la luna kalendaro. La neĝo falis ĉiam pli dense. Apenaŭ krepuskiĝis, nudpieda kuracisto Vej Lianggong eliris kun medikamenta kesto por kuraci malsanulojn en la vilaĝo. Vesperiĝis. Ĉiuj komunumanoj ĝoje preparis sin por pasigi la Printempan Feston, tamen Vej Lianggong ankoraŭ rapidis en vento kaj neĝado. Kiam li revenis hejmen, estis jam la naŭa horo de la vespero. Apenaŭ lia edzino varmigis manĝaĵon por li, malriĉkamparano Vej Ĝiguj alkuris kaj diris al li, ke lia patrino malsaniĝis.

Li tuj demetis bovlon kun manĝaĵo kaj foriris kun Vej Ĝiguj. Li revenis hejmen jam post la noktmezo. Kiam li ĵus finis la manĝon kaj kuŝis sur la lito por dormi, alvenis iu por voki lin al komunumano Luo Huahiang, kiun denove atakis stomaka malsano. Vej Lianggong senhezite ellitiĝis kaj foriris. Ĉifoje, kiam li revenis hejmen, kokoj en la vilaĝo jam kokerikis.

Ĝuste tiel Vej Lianggong pasigis festojn unu post alia.

Vej Lianggong estas nudpieda kuracisto de Ĝangdun-brigado de Jugi-komunumo en Ŝoŭhian-gubernio, Anhuj-provinco. Nur kvar jarojn li vizitis lernejon, tamen sub kulturado kaj edukado de la Partio li diligente lernis kuracarton kaj senĉese altigis teknikan nivelon en sia praktiko. Nun li jam povas venki multajn malsanojn per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino.

Komunumano onklino Gin Giagju estis turmentata de apendica absceso, sentis doloron je ventro kaj febris. Kiel ajn okupata estis Vej Lianggong, ĉiutage li nepre ir-reiris kvin kilometrojn por ĝustatempe injekti kaj sendi medikamentojn al ŝi. Iuvespere pluvegis. La onklino jam kuŝiĝis por dormi pensante ke li ne povos veni en la pluvego. Sed ekster ŝia atendo Vej Lianggong venis tramalsekigita. Rigardante lian ridetantan vizaĝon, la onklino larmis pro forta kortuŝiĝo kaj eĉ unu vorton ne povis eldiri.

Okazis liena kreviĝo al patrino de malriĉkamparano-komunumano Ĝang Hiuli pro defalo dum irado kaj estis necese tuj sendi ŝin al hospitalo 25 kilometrojn fore por ricevi operacion. Aŭdinte tion Vej Lianggong, kiu tre laciĝis de la servoj dum la tago kaj pretis hejmeniri por vespermanĝi, senhezite eliris por akompani la onklinon al la hospitalo. Survoje li jen flegis la onklinon, jen portis brankardon. En la hospitalo li bone finis aranĝon al la paciento kaj tuj revenis senripoze por prizorgi kelkajn malsanajn komunumanojn en la vilaĝo. Enirinte la hejmvilaĝon posttagmeze li svenis pro troa laciĝo...

En la lastaj jaroj li ofte vizitis ĉiun el 500 familioj de la 15 produktaj grupoj. En la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo ĉie cirkulis la faroj de Vej Lianggong pri lia tutkora servado al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

## POST DIPLOMIĜO EN ALTA LERNEJO

Hu Gieping estis nudpieda kuracisto de Gianhu-brigado. En 1970 la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elekte sendis lin al la Nova Medicina Kolegio de Giangsu por lerni. Post la diplomiĝo li revenis al sia hejmvilaĝo kaj laboris kiel nudpieda kuracisto. Same kiel antaŭe, li kun la medikamenta kesto kuracas la komunumanojn ĉe kamprandoj aŭ en iliaj domoj.

*Hu Gieping (la dua de dekstre) vizitas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn.*



Antaŭ ol lerni en la alta lernejo Hu Gieping povis nur kuraci ordinarajn kaj negravajn malsanojn. Nun li pene aplikas la ellernitajn sciojn en la praktiko kaj senĉese altigis teknikon de kuraco. Ĉe juna komunumanino Ĝoŭ Joŭhua ĉesis menstrua funkcio kvin jarojn. Rezulte de tio ŝia vizaĝo flaviĝis, ŝiaj haroj defalis kaj fine ŝi perdis laborkapablon. Multfoje ŝi vizitis hospitalon, sed ricevis nenian efikon kaj pro tio ŝi tre malĝojis en la koro. Ankaŭ Hu Gieping maltrankviliĝis por ŝi. Reveninte post diplomiĝo en la kolegio li ekzamenis ŝin, detale analizis la malsanon kaj fine trovis la kaŭzon. Li konsolis Ĝoŭ Joŭhua: "Vi estas kuracebla kaj mi renkontis similajn kazojn dum mia lernado en la alta lernejo." Aŭskultinte tion la lasta tre ĝojis. Hu Gieping kuracis ŝin

per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Post unu monato ĉe Ĝoŭ Joŭhua refunkciis menstruo, ankaŭ ŝiaj kapharoj elkreskis kaj aliaj simptomoj malaperis. Nun ŝi denove povas energie labori sur kampoj.

Hu Gieping zorgas ne nur pri kuracado de malsanuloj, sed ankaŭ pri ŝparo de la kolektiva elspezo por firmigi la kooperan kurac-sistemon. Li ofte kuracas komunumanojn per drogherboj, akupunkturo kaj per la metodoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Cetere li ofte kuraĝigis la amasojn por kolekti drogherbojn. La sanitarejo de la brigado mem kulturas du muojn da drogherboj kaj Hu Gieping resanigis komunumaninon Huan Genkuang suferantan de mamglandito per kakto kulturita de li mem. Krome li ankoraŭ venkis artriton de Lu Ĵenkang per akupunkturo.

Hju King, filino de Hju Ĝiŝeng, suferis akutan hepatiton. En la dua tago, kiam Hu Gieping kuracis ŝin, Hju Ĝiŝeng sendis ŝin al la gubernia hospitalo timante ke li ne povas resanigi lian filinon. Sed la hospitalo donis medikamentojn al ŝia filino samajn kiel tiuj de Hu Gieping. Konsiderante ke por kuraci en la hospitalo li ne nur devas pagi multe da mono sed ankaŭ ne povas partopreni en laboro, li do decidis reporti la filinon kaj petis Hu Gieping kuraci ŝin.

Hu Ĝieping lokis Hju King en la sanitarejo. Li flegadis kaj kuracis ŝin en tuta forto kaj post duonmonato ŝi resaniĝis.

Por resanigi Hju King la sanitarejo de la brigado elspezis nur 13 juanojn. Dum la kuracado la membroj de la familio de Hju King ĉiutage povis partopreni en la produkta laboro kaj pro tio Hju Ĝiŝeng multe laŭdis la kooperan kurac-sistemon.

# Batalo de la laboranta popolo kontraŭ Konfucio en la historio

de TIAN KAJ

LA reakciaj regantaj klasoj kultis Konfucion kiel "sanktulon" kaj adoris konfucianismon kiel "sanktan doktrinon", dum la laboranta popolo nomis lin "rabisto Kongkiu" kaj klasikaĵojn pri konfucianismo "herezaj libroj". La du malsamaj sintenoj klare spegulis la radikalan antagonismon en ideologio inter la vastaj laborantaj popolamasoj kaj la reakciaj regantaj klasoj de nia lando.

Kiel pensulo obstine defendanta la sklavan sistemon, Konfucio ĉiam kontraŭstaris rekte la grandan historian fluon de la liberigo de sklavoj per siaj paroloj kaj agoj. Tial, apenaŭ li ascendis politikan scenejon kaj komencis sian kontraŭrevolucian agadon, la sklavoj jam faris pint-kontraŭpintan batalon kontraŭ li.

Dum Konfucio vivis en la mondo, sklavoj jam riproĉis lin kiel homon kun "membroj mallaboremaj ne povantan distingi la kvin grenojn". La akra kritiko esprimis grandan malestimon de la laboruloj al Konfucio, ekspluatanto kaj parazito. De tiam la homo kun "membroj mallaboremaj ne povanta distingi la kvin grenojn" fariĝis la tipo de ekspluataj klasoj kaj iliaj intelektuloj. La gvidanto de la sklava leviĝo Ĝi de Liuhia rifuzis akcepti Konfucion, nomante lin homo kiu "akiras manĝaĵon sen terkulturado kaj vestaĵon sen teksado". Akiri ĉion sen laborado estas naturo de Konfucio kaj de li reprezentata sklavposedanta klaso, kaj la ekzisto de tiu klaso ĝuste estas kaŭzo de la suferoj de la sklavoj. Esence, la batalo de la sklavoj kontraŭ Konfucio estas speguliĝo de ilia klasa postulo pri batalo kontraŭ ekspluato kaj subpremo por liberiĝo kaj emancipiĝo.


Ankaŭ la reakcia politika starpunkto de Konfucio pri restarigo de antikva sistemo kaj regreso

*Ĝi de Liuhia, la heroo de sklava leviĝo, indigne kaj akre kritikas Konfucion.*



trafis akran kritikon de la sklavoj. En la periodo, kiam vivis Konfucio, disfalo de la sklava sistemo jam fariĝis neevitebla tendenco. Li tamen ĉie klopodis energie por savi ĝin el pereo, flirtigante la flagon "restarigi la pereintajn regnojn, daŭrigi la perdiĝintajn aristokratajn familiojn kaj relevi la defalintajn aristokratojn". Kontraŭ tio la laborantaj popolanoj havis fortegan malkontenton kaj indignon. Iu pordgardisto riproĉis Konfucion kiel obstinan elementon nekonantan la historian leĝon. Tiam du laboruloj diris: "La disfalo de la sklava sistemo estas kvazaŭ torenta fluo. Kiu povas ŝanĝi tiun historian tendencon? Konfucio provas tion fari, tio plene montras, ke li ne konas sin mem!" Ĝi de Liuhia indigne montris, ke Konfucio havas ekstreme grandajn krimojn pro tio ke li provas adori Venvang kaj Vuvang (Vuvang estis fondinto de Okcidenta Ĝoŭ-dinastio kaj Venvang estis lia patro), jesigi antikvecon kaj nei estantecon, returni la historian radon kaj obstine protekti la kriman sklavan sistemon.

La sklavoj neis la ideologian sistemon de Konfucio kun *ĵen* (bonkoreco) kiel kerno. Ĝi de Liuhia deklaris: "Ĉiuj vortoj de Kongkiu estas ĝuste tiuj, kiujn mi forĵetas." Laŭ Konfucio, se ĉiuj "amas la gepatrojn kaj respektas pliaĝan fraton", do ne estus ribelo kontraŭ la superuloj, tial la "amo al la gepatroj kaj respekto al pliaĝa frato" estas esenco de *ĵen*. Ĝi de Liuhia kritikis *ĵen* de Konfucio ĝuste komence de tiu esenco. Li donis ekzemplojn por pruvi "malhumanecon", "neamon kaj nerespekton", "diboĉon", "bruligadon kaj murdadon" kaj "ribelon" de la sklavposedantaj aristokrataj regantoj kaj per tio malkovris, ke Konfucio pledis por "amo kaj respekto" ĝuste por trompi la popolon. Konforme al interesoj de la sklava klaso Ĝi elmetis koncepton pri moralo tute malsaman al tiu de Konfucio. Laŭ lia opinio, la plej malbona moralo estas tio, ke sklavposedantoj akiras ĉion sen laborado, kaj la plej bona moralo estas tio, ke la sklavoj ribelas kontraŭ la sklavposedantoj kaj deprenas de ili rabitan riĉaĵon. El paroloj kaj agoj de Konfucio la sklavoj jam konis, ke li ĉiam parolas vortojn kvankam pri *ĵen*, *ji*, *daŭ*, *de* (bonkoreco, justeco, vero kaj bonmoralo) sur la lipoj, tamen li estas fakte ruza kaj senhonta aĉulo, reakcia politikistaĉo "movanta sian langon por krei mensogon" kaj "parolanta belajn vortojn por ĉasi riĉecon kaj altrangon" kaj hipokritulo "flatanta vidal-vide kaj kalumnianta postdorse". El la historiaj faktoj ni jam povas vidi, ke Konfucio estis ja hipokrita malnoblulo, kiu parolis ĉiujn belajn vortojn, sed faris ĉiajn malbonajn aferojn.




*La kamparana leviĝo gvidata de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang forte batas la reakciajn pensojn de Konfucio.*

Pro sia naturo de sklavposedanta aristokrata klaso Konfucio treege malamis la sklavojn kaj eĉ publike insultis la laborantajn popolanojn, ke ili estas "birdoj kaj bestoj kun kiuj homoj ne povas kunesti". Kompreneble la sklavoj havis ĝisostan malamon al li. Kien ajn Konfucio iris, la laboranta popolo ĉiam mokis lin. Oni malliberigis lin en Kuang, ne liveris al li manĝaĵon en Ĉen kaj insultis lin kiel "hundon perdintan sian neston" en Ĝeng. La revolucia spirito de la batalo de la sklavoj kontraŭ Konfucio spegulis ilian decidon renversi la kriman sklavan sistemon. Ĝuste la persista kaj brava batalo de la sklavoj ĝisfunde ŝancelis la bazon de regado de la sklava sistemo kaj akcelis la transformiĝon de la sklava sistemo al la feŭda.

En la feŭda socio, la doktrinoj de Konfucio pri socia hierarkio kaj koncepto pri patriarka etiko protektantaj la sklavan sistemon fariĝis teoria bazo de la feŭda sistemo kaj spirita armilo uzata de la bienula klaso por subpremi la kamparanojn, post transformado fare de intelektuloj de la bienula klaso. Tial, en la feŭda socio je pli ol 2,000 jaroj longa, ĉiuj kamparanaj revoluciaj bataloj de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang ĝis la Tajping-a Ĉiela Regno senescepte tuŝis Konfucion kaj lian reakcian penson.

La gvidantoj de la kamparana leviĝo unua en la historio de Ĉinio Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang diris: "Ĉu imperiestroj, dukoj, generaloj kaj ministroj estas denaske destinitaj por esti tiaj!", neante ke potenco de suvereno estas donita de la ĉielo. En tio ili kritikis fakte la ideisman antaŭdestinismon de Konfucio kaj lian reakcian tezon pri "konvena konduto de la suvereno kaj subuloj". En la finaj jaroj de Orienta Han-dinastio Leviĝo Huanggin (Huanggin signifas flavan tukon. Ĉar la leviĝantoj portis flavan tukon sur la kapo, tial oni nomis la leviĝon Huanggin.) postulis transformi la "ĉielon" de la bienula klaso en tiun de la kamparana klaso, tio efektive estis forta kritiko al ideisma metafiziko de konfucianoj pri "neniam ŝanĝiĝas la ĉielo nek la *daŭ*." (*Daŭ* estas komune uzata termino inter la ĉinaj antikvaj filozofoj, kun la sencoj de "vojo" aŭ "principo" kaj ankaŭ de "leĝo" aŭ "regulo".) La kamparana leviĝo en la finaj jaroj de Tang-dinastio unuafoje starigis la flagon de "egaleco" kaj tiu de Song-dinastio elmetis la sloganon de "egaleco inter nobeloj kaj pleboj kaj egaldivido de riĉaĵoj". La Leviĝo de Armeo Honggin (Honggin signifas ruĝan tukon, kiun la armeo portis sur la kapo.) de Juan-dinastio elmetis la sloganon "mortigi ĉiujn maljustulojn" kaj la Leviĝo de Li Ziĉeng en finaj jaroj de Ming-dinastio elmetis la sloganon "egaldividi kampojn kaj aboli impostojn" k. a. Ĉio ĉi tio montris la simplajn postulojn de la kamparanoj de nia lando pri egaleco en socia pozicio kaj persona posedaĵo en la batalo kontraŭ la feŭda sistemo. Tiu penso evidente kontraŭstaris la penson de Konfucio protektantan la patriarkan hierarkion, tial ĉiuj kamparanaj leviĝoj de la historio neeviteble rekte aŭ nerekte atakis Konfucion, la defendanton de la feŭda sistemo.

La leviĝantaj kamparanoj per siaj revoluciaj agadoj ankoraŭ rekte provokis la "sanktulon" de la feŭda reganta klaso. En finaj jaroj de Gin-dinastio iu trupo de Leviĝo de Armeo Hong-aŭ (Hong-aŭ signifas ruĝan veston, kiun la armeo sin vestis.) estrita de Haŭ Ding okupis Kjufu, la hejmlokon de Konfucio, forbruligis Templon de Konfucio, ke "ĝiaj haloj kaj koridoroj duone fariĝis cindroj", kaj ili forbruligis ankaŭ tri juniperojn laŭdire plan-

titajn de Konfucio propramane, por esprimi senkomparan indignon kontraŭ li. En la meza periodo de Ming-dinastio ankaŭ la kamparana leviĝo gvidata de Liu Liu kaj Liu Ki okupis Kjufu. Ili tranoktis en Templo de Konfucio, nutris militĉevalojn en tiu "sanktejo" kaj ĵetis "kvar librojn" kaj "kvin klasikaĵojn" zorgeme konservatajn tie en basenon de malpura akvo por esprimi sian malamegon al Konfucio kaj lia penso.

En mezo de la 19-a jarcento la revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno gvidata de Hong Hiukjuan estis kamparana leviĝo la plej granda en la historio de nia lando kaj ankaŭ senprecedence grandioza movado kontraŭ Konfucio en historio de nia lando. La okulfrapa karaktero de la revolucio estas, ke ĝi klare ligis renverson de la feŭda aŭtokratismo kun disfaligo de konfucianismo, la spirita apogilo de la

*La revolucia armeo de la leviĝo Huanggin senkompate refutas konfucianismon.*




feŭda regado, kaj faris akran kritikon al Konfucio kaj lia reakcia penso.

Unu jaron post finiĝo de la Opia Milito, Hong Hiukjuan kun revolucia braveco ruinigis kulttabulon de "la plej granda kaj sankta majstro Konfucio" en vilaĝlernejo, kie li faris instruadon, publike deklarante militon kontraŭ Konfucio kaj la tuta feŭda sistemo. Poste, por kuraĝigi kamparanojn liberigi sin el kateno de la feŭda tradicia ideologio, li verkis rakonton, en kiu li kreis "dion-imperiestron", kiu riproĉis librojn de Konfucio pro iliaj multaj eraroj, kiuj malbone edukis aliajn, kaj kolere ordonis vipadi Konfucion, kaj la lasta surgenuiĝis por peti indulgon. La "dio-imperiestro" estis ĝuste figuro de la revoluciaj kamparanoj kiuj batalas por sin liberigi, kaj la riproĉo kaj vipado de la "dio-imperiestro" al Konfucio estis senkompata kritiko kaj kondamno de la revoluciaj kamparanoj al li. Tiu rakonto esprimis klaran nuancon de la firma batalo de la revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno kontraŭ Konfucio.

Hong Hiukjuan montris: "En la fina analizo, la fiagoj de diabloj estas kaŭzitaj de la libroj de Konfucio kun multaj eraroj." Li opiniis, ke la reakcia penso de Konfucio estas ideologia kialo de diversaj krimoj de la feŭda regado. Tial la Tajping-a Ĉiela Regno kondamnis klasikaĵojn pri konfucianismo kiel "herezajn librojn", kaj malpermesis ilin legi. "Ĉiuj herezaj libroj pri konfucianismo devas esti forbruligitaj kaj estas malpermesite ilin kaŝe konservi kaj legi." Post kiam ĝi prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon, ĝi speciale fondis "administracion por revizii librojn", kiu faris ekzamenon kaj forstrekon al la klasikaj libroj de konfucianoj sub la persona gvido de Hong Hiukjuan.

La Tajping-a Ĉiela Regno publikigis serion da revoluciaj literaturoj, kiuj eksplikas teoriojn de revolucio, kaj laŭ tiuj teorioj ellaboris serion da revoluciaj politikoj kaj metodoj, kio teorie kaj praktike forlavis reakcian penson de Konfucio kaj forte batis la feŭdan sistemon. La revoluciaj literaturoj de Hong Hiukjuan resumis spertojn de la kamparanaj leviĝoj en la historio kaj levis al nova etapo la ideologion de la kamparana revolucio de antikva Ĉinio. La lancpinto de la literaturoj rekte direktiĝis al ideologio kaj sistemo de la feŭda patriarko kaj ĝia teoria bazo — penso de Konfucio.

Estas menciinde, ke la Tajping-a Ĉiela Regno firme kritikis la reakcian penson de konfucianismo pri "viroj — nobelaj kaj virinoj — plebaj", draste skuis la feŭdan aŭtoritaton de la edzo kaj aliajn tezojn katenantajn virinojn kaj elmetis revolucian

proponon por liberigi virinojn. Hong Hiukjuan diris: "En la mondo viroj estas fratoj kaj virinoj fratinoj." Li pledis por egaleco inter ĉiuj kaj egaleco inter viroj kaj virinoj, kaj difinis, ke "oni distribuas kampojn laŭ nombro de homoj sendiference de viro aŭ virino", por ke virinoj ĝuu egalecon kun viroj en ekonomio. En la revolucia vicaro de la Tajping-a Ĉiela Regno virinoj povis partopreni en politiko kaj fariĝi oficistoj, batali kune kun viroj ŝultre ĉe ŝultro kaj trapasi ŝtatan ekzamenon por esti oficistoj, tiel ke virinoj ĝuis egalecon kun viroj en politiko, militaj aferoj kaj kulturo. Por levi la socian pozicion de virinoj estis klare difinite: "Oni ne devas konsideri pri riĉaĵo en geedziĝo", malpermesi akiron de edzino per aĉeto, aĉeton de servsklavino, prostituiĝon kaj aboli volvon de piedoj kaj aliajn malbonajn kutimojn malhonorigantajn virinojn. Ĉio ĉi tio montris, ke la tiama batalo de la kamparana klaso de nia lando por rompi la feŭdan patriarkan regadon jam eniris en novan etapon.

La revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno vekis ekstreman teruron kaj ĝisostan malamon de la feŭda reganta klaso. Zeng Guofan, ekzekutisto en subpremo de la revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno, veis: "Klasikaj principoj pri etiko de miloj da jaroj en Ĉinio estas ĉiuj forbalaitaj. Tio estas granda katastrofo ne nur por King-dinastio, sed ankaŭ neniam renkontita ekde kreo de konfucianismo, kaj pro tio Konfucio kaj Mencio plorus en siaj tomboj." La kalumnio kaj veo de la reakciuloj pruvis de kontraŭa flanko, ke la movado de la Tajping-a Ĉiela Regno kontraŭ Konfucio vere trafis esencon de la feŭda reganta klaso.




*La kamparana revolucio gvidata de Hong Hiukjuan disvolvas grandiozan movadon kondamnantan Konfucion.*

Kompare kun bataloj kontraŭ Konfucio fare de la bienula kaj burĝa klasoj en ilia leviĝanta periodo, tiuj de la laboranta popolo en la historio de nia lando havas malsaman karakteron. Antaŭ gajno de sia regpotenco kaj en certa tempo post tio, la ekspluataj klasoj reprezentis direkton de la socia antaŭenmarŝo kaj postulis ŝanĝon de la malnovaj sociaj sistemoj kaj starigon kaj firmigon de sia regado. Tiam ili forte oponis kontraŭ penso de Konfucio, kiu pledas por restarigo de antikva sistemo kaj regreso. Iliaj malkovro kaj kritiko al la penso de Konfucio estis akraj, profundaj kaj havis revolucian signifon, tamen ilia kritiko al Konfucio povis atingi nur tiun gradon. La laboranta popolo malkovris, ke Konfucio estis ne nur obstina elemento por restarigi antikvan sistemon, sed ankaŭ parazito el ekspluata klaso. Post kiam la bienula kaj burĝa klasoj fariĝis novaj regantoj, ili ne plu postulis ŝanĝon de socio pro ŝanĝiĝo de sia socia pozicio, sed sin okupis energie pri firmigo de sia regado kaj iom post iom ili turniĝis de kontraŭkonfucianismuloj al konfucianismokultantoj. Ĉar la fundamentaj interesoj de la laboranta popolo konformis al antaŭenmarŝa direkto de la socia disvolviĝo, ili estis decida forto de la socia ŝanĝiĝo kaj ĉiam staris ĉe la fronto de la batalo kontraŭ Konfucio.

La nove leviĝantaj bienula kaj burĝa klasoj kritikis Konfucion ja por anstataŭigi malnovan ekspluatan sistemon per la nova. Tamen la laboranta popolo subpremata kaj ekspluatata batalis kontraŭ Konfucio por oponi kontraŭ ekspluatado kaj subpremado de ĉiuj klasoj. Elirante el siaj klasaj interesoj, la laboranta popolo elmetis revolucian koncepton pri "egaligo" kontraŭstarantan kun doktrinoj de Konfucio pri "*jen, ji*" (bonkoreco

kaj justeco). Tio estas neatingebla por ĉiu ajn progresema pensulo de ekspluataj klasoj. En la batalo la laboranta popolo elmetis revoluciajn sloganojn "egaleco de ĉiuj antaŭ leĝo" kaj "egaleco inter nobelaj kaj plebaj, egaldivido de riĉaĵoj ", kiuj esprimis ilian simplan deziron postuli radikale aboli hierarkion kaj diferencon de klasoj. Lenin montris: **"Penso de egaleco — la plej revolucia penso en batalo kontraŭ malnova ordo de absolutismo ĝenerale — kaj kontraŭ malnova servutulmastra, grandbienula terposedo precipe."** (*Agrara Programo de la Social-demokratio en la Unua Rusa Revolucio de 1905—1907*)

La laboranta popolo de la historio ja havis limigitecon de sia klaso kaj epoko en kritikado kontraŭ Konfucio. Ĉu la sklava klaso aŭ kamparana klaso, ili ne estas reprezentantoj de la nova produkta formo, ili povis nek pledi por anstataŭigi la malnovan socian sistemon per la nova, nek kontraŭstari mondkoncepton de la ekspluataj klasoj per la scienca mondkoncepto. Ili ne eblis malkovri klasajn interesojn reprezentatajn de Konfucio, nek ĝuste koni klasan enhavon de batalo inter konfucianismo kaj legalizismo. Kvankam ilia batalo kontraŭ Konfucio donis fortegan baton al lia reakcia penso, tamen ne povis venki en tio, nek anstataŭi ĝin. Tiun taskon povas plenumi nur la proletaro.

*La kamparana leviĝo de Li Ziĉeng forte kritikas konfucianismon.*




En la periodo de la granda Movado de la 4-a de Majo la proletaro de nia lando ascendis la historian scenejon kaj fariĝis gvida klaso de la revolucio. Sub direktado de Marksismo-Leninismo ĝi komencis novan demokratian revolucion ĝisfunde kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman, kaj malfermis novan paĝon de la batalo de la laboranta popolo de nia lando kontraŭ Konfucio. "For Kong-butikon" estis sonora batal-slogano elmetita en tiu periodo. Prezidanto Maŭ montris: **"La kultura revolucio enkondukita de la Movado de la 4-a de Majo estis movado ĝisfunde oponanta feŭdan kulturon; kaj estis ankoraŭ neniam konata tiel granda kaj ĝisfunda kultura revolucio en la ĉina historio."** (*Pri Nova Demokratio*) Post la movado la kultura armeo armita per Marksismo-Leninismo faris bravan atakon al kelkmil-jara feŭda kulturo reprezentata de la penso de Konfucio kaj montris en tio ĝisfundan revolucian spiriton de la proletaro pri rompo kun ĉiuj tradiciaj konceptoj. En sia serio da artikoloj, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ profunde kritikis la reakcian penson de Konfucio per marksisma mondkoncepto, en strikta ligo kun praktiko de la nova demokratia revolucio. En sia verko *Pri Popola Demokratia Diktaturo* skribita antaŭvespere de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Maŭ klare kritikis reakciecon de "humana politiko" de Konfucio kaj la verko fariĝis programo por firmigi nian proletan diktaturon. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko Prezidanto Maŭ gvidis la unuan grandan kampanjon en la ideologia kaj kultura fronto — kritikon al reakcia filmo *La Vivo de Vu Hjun*, kio deŝiris per faktoj hipokritan maskon de konfucianismo kaj malkovris reakcian vizaĝon de Vu Hjun, kiu servis al la bienula klaso kaj reakcia registaro. De tiam kritiko aŭ kulto al Konfucio fariĝis grava enhavo de la batalo ĉu praktiki marksismon aŭ reviziismon sur ideologia fronto, ĉu firmigi proletan diktaturon aŭ renversi ĝin en la periodo de la socialisma revolucio.




# LUSIN

## —Granda Revoluciulo, Pensulo kaj Literaturisto




1.




2.




4.



5.



3.



6.

1. **Por la Vero.** Lusin naskiĝis en Ŝaŭhing, Ĝegiang-provinco, 1881. Tiutempe, la agresado de la imperiistoj al Ĉinio kaj la senhonta naciperfido de la registaro de King-dinastio puŝis Ĉinion en duonkolonian kaj duonfeŭdan socion kaj dronigis la vastan popolamason en mizeran abismon. Ĉio ĉi tio vekis ĉe Lusin deziron serĉi la veron. En la jaro 1898, Lusin senhezite forlasis sian hejmlokon kaj veturis al Nankino por tie viziti lernejon.

2. **"Mi Oferos Mian Sangon al la Patrolando".** En la jaro 1902, Lusin lernis en Japanio. Post nelonge, li faris por sia foto versaĵon, en kiu li esprimis sian grandan volon, ĵurante oferi sian varman sangon al la liberiga afero de la patrolando.

3. **Ĉesi Studi Medicinon kaj Entrepreni Novan Kulturon.** Post la eksplodo de la milito inter Japanio kaj Rusio, la imperiistoj pluapaŝe dividis Ĉinion. Lusin tiam decideme ĉesis studi medicinon kaj ekokupis sin pri nova kulturo por reformi la socion.

4. **Propagando sur Strato.** Kiam okazis la Revolucio de 1911, Lusin estis instruisto en Ŝaŭhing. Tiam li varme bonvenigis tiun ĉi revolucion kaj organizis "armitan propagandan taĉmenton" de lernantoj por propagandi sur stratoj.

5. **Aŭroro de Nova Erao.** Lusin estis kuraĝigita de la venko de la Oktobra Revolucio de Rusio, el kio li vidis "aŭroron de nova erao". En la jaro 1919, eksplodis Movado de la 4-a de Majo kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma, li kun nova energio sin ĵetis en tiun batalan vicaron kaj faris bravan ofensivon kontraŭ la imperiisma kaj feŭdisma kulturo.


6. **Fidela al la Proleta Revolucia Afero.** En 1921, la ĉina proletaro kaj la Komunista Partio de Ĉinio ascendis la ĉinan politikan scenejon. Lusin, tiam klopodanta por "gajni lumon" por la patrolando, aktive sin ĵetis en la revolucian batalon gvidatan de la proletaro kaj persistis en tio ĝis la fino per sia revolucia literaturo kaj arto kiel la armilo.



7.




8.



10.



11.



9.




12.

7. **Subteno al la Justa Batalo de la Studentinoj de la Virina Instruista Universitato.** Influite de la laborista kaj kamparana movado, la Pekina Virina Instruista Universitato levis, en la jaro 1925, revolucian studentan tajdon por forpeli la reakcian lernejestrinon. Lusin tiam firme staris ĉe la flanko de la revoluciaj studentinoj kaj faris pinto-kontraŭ-pintan batalon al la reakciaj fortoj.

8. **En la Urĝa Kunveno pri Lernejaj Aferoj de la Kantona Ĝongŝan-Universitato.** En aprilo de 1927, Kuomintango perfidis la revolucion kaj sange masakris la ĉinajn komunistojn kaj revoluciajn amasojn. En la urĝa kunveno pri la lernejaj aferoj de Ĝongŝan-universitato Lusin forte protestis la krimojn de la kuomintangaj reakciuloj.

9 **Diligenta Studo pri Marksismo.** La fakto de kruela klasbatalo forte ekscitis Lusin. En oktobro de 1927, Lusin venis de Kantono al Ŝanhajo, kie li ĉiam studis la teorion de Marksismo kombinante la praktikon de revolucia batalo. De tiam, li firme starigis en si marksisman mondkoncepton kaj fariĝis granda komunisto.

10. **Parolado en la Kunveno de Fondiĝo de la Unio de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj.** Ekde la fondiĝo de la unio, ĉiam ekzistis la batalo inter la du linioj. En la kunveno de ĝia fondiĝo, je la 2-a de marto, 1930, Lusin faris paroladon "Mia Opinio pri la Unio de Maldekstraj Verkistoj", kiu forte kritikis la "maldekstran" oportunisman linion de Vang Ming antaŭenpuŝitan de Ĝoŭ Jang kaj similaj.

11. **Gratula Telegramo al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio.** En la jaro 1935, la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo venke atingis la nordan Ŝenhi-provincon post la Longa Marŝo, kio ekstreme ĝojigis la malsanan Lusin. Li tuj sendis telegramon al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio: "Al vi estas konfidita la espero de Ĉinio kaj la homaro." Tio montris la profundan proletan amon de Lusin al Prezidanto Maŭ kaj la Partio.


12. **Forta Refuto al Ĝoŭ Jang kaj Similaj.** En 1936, Ĝoŭ Jang kaj similaj energie antaŭenpuŝis la dekstran oportunisman linion de Vang Ming. Lusin faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ ili kaj per la marksisma politika vidkapablo travidis, ke ili ne estas veraj revoluciuloj, kaj malkovris pseŭdmarksismajn kontraŭrevoluciajn duvizaĝulojn ŝteliĝintajn en revolucian vicaron. Per tio li montris sian sentiman revolucian spiriton kontraŭtajdan.



13.

**13. Zorgo kaj Kulturo al Gejunuloj.** Lusin rigardis gejunulojn kiel revolucian estontecon. Li ofte kuraĝigis gejunulojn zorgi ŝtatajn kaj sociajn praktikajn problemojn, stari ĉe la flanko de laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj firme batali. Por kulturi revoluciajn gejunulojn, li diligente faris konkretajn laborojn por ili. Por favorigi la revolucion kaj gejunulojn, li povis eĉ sin oferi.

**14. Oferi Sian Tutan Vivon al la Revolucio.** Komunisto Lusin brave batalis dum la tuta vivo por la liberiga afero de la ĉina popolo sur la kultura kaj ideologia frontoj, kaj forpasis en oktobro de 1936. Lia firma kaj ĝisfina revolucia spirito ĉiam kuraĝigas la ĉinan popolon daŭrigi la revolucion sub la proleta diktaturo ĝisfine laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.



14.

# Batalado kontraŭ sekegeco ĉe la piedo de Flama Monto

ĈIJARE Ŝanŝan-gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono ĉe la piedo de la Flama Monto trafis sekegecon maloftan en la lastaj cent jaroj. Rompiĝis fluo al iuj riveretoj kaj mankis akvo al la aliaj. Iuj subteraj kanaloj, kiuj formiĝas el subteraj fontoj, sekiĝis, kaj la aliaj multe malgrandigis sian fluon.

Tamen ĝuste en la jaro de sekegeco la popolanoj de diversaj naciecoj de Ŝanŝan-gubernio akiris rikolton de agrikulturo la plej bonan de la historio, inkluzive de senkerna blanka vinbero kaj Hamimelono fame konataj en kaj ekster la lando. Ujgura maljunulo Hamihan diris: "Mi vivas jam pli ol cent jarojn, tamen ankoraŭ ne vidis tian sekegecon! Dum sekeco, oni fuĝis aliloken en la malnova socio; sed dum sekeco kampo donis riĉajn rikoltojn en la nova socio. La vivo fariĝis ja pli kaj pli feliĉa!"

*Nova maŝinputo de Hongki-komunumo*




I

En Ŝanŝan-gubernio ni vizitis oazojn troviĝantajn dise ĉe ambaŭ flankoj de la Flama Monto kaj vidis propraokule revolucian spiriton de diversnaciecaj kadroj kaj amasoj en konstruado de socialismo, vekitan de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio.

Kiangin-komunumo ĉe la suda piedo de la Flama Monto situas en plej malsupra parto de Ertanggoŭ-rivero kaj estas plej varma loko de la gubernio. Ĉiujare ĝin atakas pli-ol-sepklasa varma vento meznombre je pli ol 40 fojoj, tial ĝiaj agrikulturaj plantaĵoj bezonas pli multe da akvo ol tiuj de aliaj regionoj. Sed ĉijare, ekde printempo la riverfluo neniam atingis la lokon, kaj ankaŭ la akvokvanto de subteraj kanaloj multe reduktiĝis. Pro manko de akvo iuj ujguraj komunumanoj devis porti trinkakvon de malproksime. Ĝuste tiam komenciĝis la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En la kvara brigado estas maljuna malriĉkamparano Sajjipuli, kiu 27 jarojn fosis subterajn kanalojn por bienulo en la malnova socio ekde sia aĝo de 16 jaroj. Teraĵo, kiun li elfosis, sufiĉas por konstrui monton kaj akvo, kiun li elkondukis, sufiĉas por formi riveron. Tamen li ĉiam restis tiel malriĉa, ke li havis nur unu lampon por lumigi dum subtera fosado kaj ĉifonan litkovrilon restigitajn de sia patro. En kritiko kontraŭ reakcia programo de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri "sinrego por restarigi la etiketon" li venis al kunvenejo kun la du objektoj kaj indigne diris: "En la malnova socio la kanala akvo de bienulo estis sango kaj larmoj de ni malriĉuloj. En sekegecaj jaroj ni kanalfosistoj devis suferi pli multe da vipado de bienuloj. Kiam ni elfosis akvon, la bienuloj vendis ĝin al malriĉuloj per altaj prezoj. Tio estas 'etiketo', kiun Lin Biaŭ volis restarigi!"


Sajjipuli estas famkonata kanalfosisto en la suda piedo de la Flama Monto de Ŝanŝan-gubernio. Konsiderante lian grandan aĝon, la brigado ne lasis lin fosi subteran kanalon de multaj jaroj, kaj nur asignis al li iujn laborojn, kiujn li povas fari laŭ sia forto. Nun li diris: "Lin Biaŭ volis restaŭri kapitalismon, kaj ni devas energie konstrui

*Diversnaciaj komunumanoj kaj kadroj kune konstruas la irigacian kanalon.*



socialismon!" Li petis brigadajn gvidantojn permesi lin ripari subteran kanalon, kiu difektiĝis kaj rompis sian fluon antaŭ ok jaroj. Kvankam la laboro estis tre peza kaj danĝera, tamen Sajjipuli firme esprimis, ke li nepre dragos la subteran kanalon kaj per tio kritikas la reakcian programon de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri "sinrego por restarigi la etiketon". Li kaj komunumanoj iris kun litaĵoj al la konstruejo, tagnokte fosadis kaj fine elkondukis grandan kvanton da subtera akvo.

En la tagoj de la intensa batalo kontraŭ sekegeco, triono de laborfortoj de la tuta komunumo ĵetis sin en fosadon de putoj funkciigataj per maŝinoj, irigacia kanalo kaj subteraj kanaloj por konduki subteran akvon. Sub la malfacilaj kondiĉoj, la komunumanoj rekonstruis kaj dragis kanalojn kun longeco de 479 kilometroj, plilongigis kaj vojŝanĝis 41 subterajn kanalojn je ĉ. 10 kilometrojn. Samtempe ili konstruis 18 kilometrojn da granda trunka kanalo kaj nove fosis 12 putojn funkciigatajn de maŝinoj. Tiuj konstruaĵoj ludas gravan rolon en la batalo kontraŭ sekegeco. La hidroelektrejo kun kapacito de 1,600 kilovatoj jam finkonstruiĝis kaj ekfunkciis. Dank' al klopodo de la tuta komunumanaro, ĉijare la komunumo akiris plej bonan rikolton de tritiko en la historio.



*Hidroelektra stacio Dongfeng*

## II

Kiam ni vizitis Ŝanŝan-gubernion, ni trovis, ke en la oficejo de la guberniaj partia komitato kaj revolucia komitato restas nur unu gvidanto por zorgi ĉiutagajn laborojn, kaj la ceteraj naŭ iris al la kamparo kun 80% de la oficejaj laborantoj sub sia gvido por partopreni en batalo kontraŭ sekegeco. Kiam ni vizitis iujn komunumojn kaj brigadojn, ni ankaŭ ne trovis iliajn kadrojn en la oficejo. Oni diris al ni: "Vi devas iri al fontejo, kanaloj kaj putoj por trovi ilin." En la lasta pli ol duonjaro la kadroj de la diversaj niveloj de la gubernio ĉiam laboris kune kun amasoj.

En la putokonstruejo de Dongfeng-komunumo, ni trovis Ĝang Hiangfu, sekretarion de la partia komitato de la komunumo. Li kaj komunumanoj kune akvumis kampon en pli ol 20 noktoj. Ĉirkaŭ duono de kampoj de la komunumo devas esti irigaciata per neĝakvo el Kekeja-rivero. Ĉijare, tie reduktiĝis akvo ne nur en la rivero sed ankaŭ en subteraj kanaloj. En la komenco de la jaro, dum diskutado pri plano de semado, la partiaj komitatanoj de la komunumo unue profundiĝis en iujn brigadojn kaj grupojn por fari enketadon kaj trovis, ke plej bone kreskas plantaĵoj en la kvina brigado, al kiu antaŭe ĉiam mankis akvo. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio la partia filio de la brigado petis iujn spertriĉajn maljunajn malriĉkamparanojn por enketadi pri montoj, riveroj kaj kanaloj de la tuta brigado. Post monata esplorado ili trovis subteran akvofluon, sekve ili fosis putojn kaj subterajn kanalojn, tiel ke la irigacia areo plivastiĝis je pli ol 300 hektaroj.

La afero de la kvina brigado profunde edifis la membrojn de la partia komitato de la komunumo. Ili komprenis, ke giganta forto por venki sekegecon kuŝas inter amasoj. Kia ajn granda estas malfacilo, oni povas venki ĝin sinapogante sur amasoj. La partia komitato de la komunumo faris decidon: Oni devas iri al la regiono kun plej serioza sekegeco, lerni de amasoj kaj mobilizi ilin al batalo kontraŭ sekegeco por gajni riĉan rikolton.

Ĝang Hiangfu kaj Mangjazi, ujgura vicsekretario de la partia komitato, unue venis al la fronto kontraŭ sekegeco. Ili kune kun spertaj maljunaj kanalfosistoj enketis kaj esploris pri fonto de akvo en subteraj kanaloj. Poste ili mobilizis komunumanojn por plilongigi kaj dragi 48 subterajn kanalojn kaj irigaciajn kanalojn, tiel ke akvokvanto plimultiĝis kaj fluo plirapidis. Krome, la funkciado



*La scienca kaj esplora grupo de la oka brigado de Dongfeng-komunumo resumas spertojn pri pliprodukto de tritiko.*

de novaj maŝinputoj mildigis la sekecon de la tuta komunumo.

### III

En batalado kontraŭ sekegeco, plue disvolviĝis la revolucia spirito de unuiĝa batalo de la popolo de Ŝanŝan-gubernio.

Hongki-komunumo ĉe la norda piedo de la Flama Monto estas loko de plej serioza sekegeco en Ŝanŝan-gubernio. La sepa brigado de Kiaŭvangke kaj la kvina brigado de Handun estas brigadoj trafitaj de sekegeco la plej serioza en tiu komunumo. Ĝis fino de aprilo en la sepa brigado de Kiaŭvangke pli ol 60 hektaroj da tritiko restis ankoraŭ ne akvumitaj kaj pli ol 6 hektaroj da kotono ne semitaj pro manko de akvo. La triono de vinbero kaj pli ol 6 hektaroj da tritiko de la kvina brigado de Handun situanta en supra parto de la rivero estis minacitaj de sekegeco. Informiĝinte ke sekegeco de la sepa brigado estas pli serioza, la kadroj de la kvina brigado iniciate proponis cedi sian akvon al la sepa brigado por ke la lasta savu la tritikon. La partia filio okazigis kunvenon por diskuti pri la afero. La komunumanoj ĉiuj diris: "Prave! Ju pli serioza estas sekegeco, des pli ni devas unuiĝi en batalo. Ni devas cedi oportunon al la aliaj brigadoj, kaj lasi al ni mem malfacilojn." Matene de la sekvanta tago la kadroj kaj komunumanoj de la kvina brigado venis al kampo por konstrui kanalon kondukan al la sepa brigado, kaj samtempe dragis ĝiajn kelkajn kanalojn. Vespere, ili kondukis la tutan akvon de sia brigado al la irigacia kanalo de la sepa brigado.

Kiam klara akvo fluis en la kampojn de tritiko kaj kotono, la kadroj kaj komunumanoj de la sepa brigado estis tre kortuŝitaj. Maljuna malriĉkamparano Vulajinmunongti diris: "En la malnova socio, sub agitado de bienuloj, ofte okazis lukto per bataliloj pro akvo inter Handun-anoj kaj Kiaŭvangke-anoj, nun, Handun ankaŭ suferanta sekecon cedis akvon al ni. Tio ja montris malsamecon de la nova kaj malnova socio. Komunumanoj diris: "Vizaĝe al sekegeco, ni ujguraj popolanoj pensas pri revolucio, zorgas pri la interesoj de la kolektivo kaj unuiĝas por unuanime fari socialisman konstruon. Tio estas forta kritiko kontraŭ Konfucio, kiu insultis nin laborantajn popolanojn ke ni nur scias akiri profiton, kaj kontraŭ Lin Biaŭ, kiu kalumniis nin laborantajn popolanojn, ke ni pensas nur pri 'edzino kaj gefiloj' ".

Tra penema duonjara lukto, Hongki-komunumo fosis 54 putojn, kiuj egalas al la nombro de la putoj fositaj post la granda kultura revolucio. Dank' al la putoj kaj subteraj kanaloj ĝia akvokvanto du-obliĝis, kaj oni akiris la bonan rikolton de someraj plantaĵoj. Nun la diversnaciecaj popolanoj de Ŝanŝan-gubernio klopodas por akiri riĉajn rikoltojn de ĉiuj plantaĵoj.

# Komunumoj ĉe la kanalo Ruĝa Flago

La kanalo Ruĝa Flago serpentas ĉirkaŭ montoj, kio montras, ke per la forto de la popola komunumo oni povas venki naturon. Por konstrui tian grandan kanalon, se oni ne sin apogus sur subteno de la ŝtato kaj sur kolektiva forto de la komunumo, do oni neniel povus akiri sukceson.

En Linhian-gubernio, krom la supre menciita kanalo, oni ankoraŭ povas trovi kelkajn aliajn irigaciajn kanalojn konstruitajn en malsamaj periodoj. Kiel mejloŝtonoj ili registris la historion de la popolanoj de Linhian-gubernio pri konstruado de akvokondukaj kanaloj post la Liberiĝo.

En la jaro 1951 post la Agrara Reformo, la liberigitaj kamparanoj de Ĉengguan konstruis la kanalon Ejguo kun longeco de 8 kilometroj, kiu povas irigacii pli ol 260 hektarojn da kampoj. Tiu sukceso jam mirigis la tutan gubernion. Tiam multaj privataj terpecoj kaŭzis al la kanala konstruo grandajn malfacilojn. Por ne tuŝi terlimojn la kanalo kun longeco de 8 kilometroj devis havi pli ol 70 kurbiĝojn.

En la kooperiga periodo, pli ol 100 altgradaj agrikulturaj kooperativoj de Hegian, Juankang kaj aliaj kvar lokoj kune konstruis la kanalon Jinghiong kun longeco de 13.5 kilometroj, tiel ke pli ol 2,600 hektaroj da kampoj, sur kiuj oni ĵus forigis terlimojn, ricevis irigaciadon.

En la periodo de la popola komunumo, 15 komunumoj de la tuta gubernio organizis akvoutiligan konstruan armeon kaj kondukis akvon de Ĝanghe-rivero al sia hejmloko. La kanalo trairas 180 tunelojn kaj 150 akveduktojn kaj povas irigacii 40,000 hektarojn da agroj kune kun la aliaj kanaloj kaj akvokonservejoj antaŭe konstruitaj. Kaj nun ilia totala longeco jam atingis 1,500 kilometrojn.

I

La popola komunumo liveris multe da laborfortoj, materialoj kaj monrimedoj por konstrui la kanalon Ruĝa Flago. De kie venis 30,840,000 labortagoj uzitaj en konstruado de la kanalo? De la popola komunumo! De kie venis dekmiloj da kilogramoj da greno bezonata de la konstruantoj? De la popola komunumo! Ankaŭ la duono de la mona investo por konstrui la kanalon venis de la popola komunumo.

En la jaro 1955, la agrikultura kooperativo Giaŭgiatun renkontis multajn malfacilojn en konstruado de malgranda akvorezervejo kun kapacito de 40,000 kubmetroj da akvo. Tiam ne sufiĉis kapitalo kaj mankis teknikistoj, oni povis nur peti helpon de la ŝtato. Krome, por la konstruado, oni devis dungi ŝtonhakistojn en aliaj vilaĝoj kaj iri sur alies montojn por haki konstruajn ŝtonojn.

Post starigo de la popola komunumo oni ne plu estas ĝenita de malfaciloj, kiujn oni renkontis en la kooperativo. La popola komunumo povas unuece aranĝi laborfortojn kaj materialojn en pli granda sfero laŭ malsamaj kondiĉoj kaj bezonoj de konstruado. Kiam mankis teknikistoj, la ĝenerala komandejo venigis ĉiujn, kiuj iam fosis tunelon en konstruado de la kanalo Jinghiong aŭ faris mezuradon sur la konstruejo de la akvorezervejo. Kiam ne sufiĉis ŝtonhakistoj, la ŝtonhakistoj de Donggang, fame konataj de la gubernio, jam estis senditaj al la konstruejoj de ĉiu komunumo por transdoni sian sperton. Pri konstruaj ŝtonoj oni havis neelĉerpeblan fonton sur la montoj.

Por konstrui ĝeneralan trunkon de la kanalo Ruĝa Flago oni konsumis 2,050 tunojn da dinamito.

En la komenca periodo de la konstruado, oni elspezis preskaŭ tutan monon por aĉeti dinamiton. Eĉ tio ne povis kontentigi la bezonon en la konstruado. Kion fari? La komandejo decidis mem solvi tiun problemon. Ĝi venigis ĉiujn el la komunumanoj laborantaj en la konstruejo, kiuj iam fabrikis grenadojn en arsenalo de Okavoja Armeo, aŭ faris petardojn, fajraĵojn, pulvon, aŭ estis ĉasistoj. Tiel stariĝis dinamita fabriko. Plejparto de dinamito uzata en konstruado de la kanalo estis fabrikita de la fabriko.

Por konstrui la kanalon Ruĝa Flago, oni konsumis 210,000 tunojn da kalko. Tiam nur du vilaĝoj Kjuŝan kaj Guogiajuan en la gubernio havis kalkpretigistojn. Kiel oni povis garantii provizon de kalko? La komandejo donis al la du vilaĝoj specialan taskon pretigi kalkon kaj kulturi kalkpretigistojn por aliaj komunumoj. Post nelonge, ĉiu komunumo ekhavis siajn lertulojn en kalkpreparado.

En dekjara konstruado de la kanalo, aplikante diversajn metodojn oni kulturis pli ol 500 teknikistojn, kiuj povas mezuri, projekti kaj gvidi konstruadon, pli ol 1,000 spertulojn, kiuj lertas en eksplodigo, tunelfosado kaj pontkonstruado kaj pli ol 60,000 ŝtonhakistojn. Ili ne nur havas altan konscion kaj plenas je fido pri nepra venko de socialismo, sed ankaŭ bone posedas teknikojn. Bori tunelon estis kompare malfacila laboro en konstruado de la kanalo. Oni ankoraŭ memoris, ke por tratrui iun dek-metran tunelon sur la kanalo Ajguo oni uzis unu jaron, kiu egalas la konstruan tempon por la kanalo. Sed ĝi estas nemenciinda kompare kun 180 tuneloj kun totala longeco de 32 kilometroj sur la kanalo Ruĝa Flago. Disvolvante spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj unuiĝa kunagado, oni sukcese truis la tunelon Ŝuguang kun longeco de 4 kilometroj per 17 monatoj, sub la kondiĉo de manko de maŝinoj. Ĝuste tiel, la popolaj komunumoj koncentris forton kaj saĝon de



*Riĉa rikolto de milio ambaŭborde de la kanalo Ruĝa Flago*

amasoj kaj venkis malfacilojn unu post alia en la konstruado.


## II

Por konstrui la kanalon Ruĝa Flago, la komunumanoj konsistigis konstruan grupon, milicanoj el la komunumanoj sin organizis en sturman grupon, laboristoj de fabrikoj funkciigataj de komunumoj riparis instrumentojn, komercaj fakoj respondecis pri provizado de materialoj, kaj la lernejoj prenis la konstruejon de la kanalo kiel klasĉambron, kombinante edukon kun produkta laboro, kaj aktive partoprenis en ĝia konstruado.

"Kion bezonas la kanalo, tion ni fabriku." Tio estas slogano elmetita de la fabrikoj de komunumoj. La konstruejo de ĉiu komunumo havis sian riparan grupon. Kiom da ŝtalaj stangoj kaj marteloj bezonis pli ol 70,000 homoj por konstrui tri trunkajn kanalojn? En konstruado de la kanalo Jinghiong, la altgrada agrikultura kooperativo ne havis sian fabrikon kaj devis iri aliloken por aĉeti tiujn instrumentojn. Nun, la fabrikoj de komunumoj kaj riparaj grupoj de brigadoj translokis siajn forĝejojn en la konstruejojn. Kiam la tunelo Ŝuguang estis plena de pulvoro, la maŝinfabriko de Donggang-komunumo portis al ĝi ventumilojn; dum fosado de la tunelo Fanhiu, la maŝinfabriko de Heŝun-komunumo sendis tien vinĉojn funkciigajn de maŝino por anstataŭigi manturnan vinĉon. Dum dekjara konstruado, sole la maŝinfabriko de Jaŭcun-komunumo jam fabrikis dekmilojn da ŝtalstangoj kaj marteloj.

"Bone faru provizon al la konstruejo." Tio estas slogano de la komercaj fakoj. Ĉiu komandejo de la komunumoj havis provizan grupon konsistantan el kadroj de komerca kooperativo; ĉiu konstruejo de la komunumoj havis sian servejon por hartondi, fliki ŝuojn kaj vestojn. Krome, kelkaj


*Hidroelektraj stacioj ĉe la kanalo Ruĝa Flago akcelas disvolvon de la industrio. Tiu foto montras ferŝtalan fabrikon en Linhian-gubernio.*



kolportistoj faris sian servon vektoportante ĉiutagajn bezonaĵojn sur la konstruejo de la brigadoj. Post la komenco de la konstruo, ĉiutage oni devis provizi dekmilojn da komunumanoj-konstruantoj per ĉirkaŭ cent tunoj da greno kaj brulaĵoj. En la unua jaro de la konstruo, sole Jaŭcun-a komerca kooperativo provizis ilin per 1,500 tunoj da karbo, cemento kaj dinamito.

La konstruejo de la kanalo Ruĝa Flago estis ankaŭ vasta ekzercejo por milicanoj. La milicanoj de Donggang-komunumo organizis sin en eksplodiga grupo. Ligante sin per ŝnuro ĉe talio, ili sin pendigis en aero por fari truon kun longeco de 30 metroj ĉe la monttalio de Ŝiziŝan kaj metis milojn da kilogramoj da dinamito en ĝin. Kiam dinamito eksplodis, densaj fumoj leviĝis, ŝtonetoj disflugis kaj klifo tuj malaperis. Tia laboro estis trovebla ĉiutage sur la konstruejo. En Vanjangpo-brigado de Hegian-komunumo troviĝas 400 junaj milicanoj, el kiuj pli ol 200 fariĝis eksplodigistoj en konstruado de la kanalo Ruĝa Flago kaj ellernis fabriki dinamiton. La tuta dinamito uzata de la brigado en konstruado de branĉaj kanaloj estis fabrikita de la milicanoj.

*Sur konstruejo de la kanalo Ruĝa Flago*



III

La popolaj komunumoj konstruis la kanalon Ruĝa Flago, kaj la kanalo riĉigis la komunumojn. Kie troviĝas kanalo, tie pliproduktiĝas greno. Post la finkonstruo de la kanalo, la produktokvanto de greno de Linhian-gubernio rapide kreskas. En la jaro 1973, la hektara produktokvanto de greno de la tuta gubernio atingis 4357 kilogramojn, tio estas 3.5-oblo de tiu en la komenca periodo de la Liberiĝo. La rezervita greno de la tuta gubernio en somero de 1974 plimultiĝis de pli ol 30,000 tunoj de 1964, antaŭ funkciado de la ĉeftrunka kanalo, ĝis 50,000 tunoj. La akumula fonduso de la popolaj komunumoj plimultiĝis de pli ol 48,000,000 juanoj ĝis 84,000,000 juanoj. En la pasinteco, la gubernio ĉiujare devis aĉeti de la ŝtato pli ol 10,000 tunojn da greno, sed en la lastaj jaroj, ĝi ĉiujare povas vendi al la ŝtato 20,000 tunojn da superflua greno. Komunumanoj diris: "La ŝtato helpis niajn popolajn komunumojn konstrui la kanalon Ruĝa Flago, kaj ni devas pli multe vendi al la ŝtato grenon por subteni socialisman konstruadon."

En la gubernio ĝojigaj informoj sekvis unu la alian.

Ĉe ambaŭ bordoj de la kanalo Ruĝa Flago jam konstruiĝis 338 akvorezervejoj mezgrandaj kaj malgrandaj, kiuj multe favorigis la agrikulturon.

Utiligante naturan akvofalan distancon oni starigis 52 malgrandajn hidroelektrejojn en la gubernio, kio akcelis rapidan disvolviĝon de industrioj funkciigataj de komunumoj de la tuta gubernio kaj havigis elektran lumon al pli ol centmil familioj de komunumanoj. La akvo de la kanalo multe altigis vivpovon de arbidoj. En la lastaj jaroj la gubernio plantis pli ol 6,000 hektarojn da arboj kaj ĉiujare produktas pli ol 20,000 tunojn da freŝaj kaj sekaj fruktoj.

De multaj jaroj la popolanoj de Linhian-gubernio malofte povis aĉeti fiŝojn. Nun en akvorezervejoj ĉe la kanalo oni bredas multajn fiŝojn, kiuj estas liverataj ne nur al la merkato de Linhian-gubernio sed ankaŭ al komunumanoj.

Dank' al la kanalo Ruĝa Flago, ĉijare la popolanoj de Linhian-gubernio venkis grandan sekegecon kaj akiris plej bonan rikolton de someraj grenoj en la historio de Linhian-gubernio. Senĉese disvolvante la revolucian spiriton de la kanala konstruado la popolo de Linhian-gubernio daŭre skribas novan paĝon de la popola komunumo per siaj sukcesoj.

REN HJUN:


# Granda ŝanĝiĝo de malgranda karbominejo

PROKSIME de Jungang-ŝtonkavoj fame konataj en nia lando troviĝas granda karbominejo Gianggiavan de la urbo Datong, Ŝanhi-provinco.

La nomita karbominejo estas ekfunkciigita de unu kadro kaj sep laboristoj en la jaro 1964 surbaze de restarigo de multjare forlasita malgranda karbominejo. En tiu jaro ĝi produktis 50,000 tunojn da karbo. En la jaro 1965, oni konstruis paron da oblikvaj ŝaktoj kun jara produktivo de 300,000 tunoj, sin apogante sur propraj fortoj en projektado kaj konstruado kaj per akumulo de produktado. En 1973 ĝia jara produktokvanto atingis 443,000 tunojn. Ĉijare, puŝate de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj oficistoj kaj laboristoj kun pli granda socialisma entuziasmo klopodas por produkti 600,000 tunojn da karbo en la tuta jaro, t.e. duoblo de projektita normo de la ŝaktoj.

Kial la karbominejo tiel rapide disvolviĝas? Kiamaniere ĝi transformiĝis de malgranda en grandan? Ĉu pro multaj investoj de la ŝtato? Ne. En sia konstruado ĝi petis de la ŝtato nur 20,000 juanojn por konstrui loĝdomojn de la laboristoj, tamen la de ĝi kreita produkta valoro jam atingis pli ol 40,000,000 juanojn. Ĉu pro ĝiaj bonaj ekipaĵoj? Ne. Ĝi ĉiam riparis kaj fabrikis ekipaĵojn ĉefe per siaj propraj fortoj kaj uzis simplan produktmetodon. Ĉu pro multaj laboristoj? Ne. Ĝi tre atentas pri ŝparo de homfortoj. Kompare kun alia karbominejo de sama produktivo, ĝiaj laboristoj estas malpli multaj je 40%.

La kaŭzo kuŝas en tio, ke ĝi plenumis la ĝustan linion. En la pasintaj dek jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong ĝi konstruiĝas kaj disvolviĝas en revolucio.



*La esplora grupo konsistanta el laboristoj, kadroj kaj teknikistoj venis en galerion por solvi malfacilan produktan problemon.*

En la jaro 1964, sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"lerni de Daking en industrio"**, Han Ĉengliang, sekretario de la partia komitato de Gianggiavan-karbominejo kaj siatempa sekretario de la partia filio de Huangtupuo-karbominejo, proponis al la partia filio, ke por pliprodukti karbon, oni refunkciigu multjare forlasitan malgrandan Gianggiavan-karbominejon helpe de Huangtupuo-minejo kaj poste konstruu paron da novaj ŝaktoj per akumulo de la malgranda karbominejo. Tiu propono vekis diskutadon. Multaj opiniis, ke estas grandaj malfaciloj por tion efektivigi, kaj iuj eĉ asertis, ke tio estas nerealigebla revo.

Han Ĉengliang unuflanke organizis la kompartianojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro* kaj la sperton de Daking en la kunveno de la partia filio, kaj aliflanke profundiĝis inter la amasojn de laboristoj por peti de ili opiniojn. Multaj maljunaj laboristoj emocie diris: "Por honorigi Prezidanton Maŭ kaj la patrolandon, la laboristoj de Daking konstruis la grandan olekampon venkinte grandajn malfacilojn, do kial ni ne povas refunkciigi la malgrandan karbominejon kaj tie konstrui paron da novaj ŝaktoj?"

Subtenate de la laboristoj kaj permesite de la supera instanco Han Ĉengliang kaj sep veteranaj laboristoj havantaj sperton de laboro en galerio venis kun ŝoveliloj kaj pioĉoj al Gianggiavan. Vizaĝe al dezerta monto kaj ŝakto plena de stagnanta akvo ili studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo.* En la lerno de Malsaĝa Avo kaj Vang Ginhi (labormodelo de Daking) ili ĵuris ne malsupreniri de sur la monto antaŭ ol refunkcios la malgranda karbominejo.

Laboristoj faris per ŝtonpecoj sur la montdeklivo ok ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn "sinapogon sur la propraj fortoj kaj peneman lukton kontraŭ malfaciloj" kaj konstruis kabanon kiel loĝejon ĉe kontraŭventa loko. La ok homoj pene laboris 40 tagojn kaj finfine drenis la akvon kaj ŝlimon en la ŝakto, tiel ke vidiĝis karbo en la ŝakto. Post tio oni aldonis laboristojn kaj grandigis la ŝakton, tiel ke la malgranda longe forlasita minejo ekproduktis 50,000 tunojn da karbo en unu jaro.

Tiu ĉi venko firmigis la memfidon de la kadroj kaj laboristoj. Ili plue elmetis planon konstrui paron da novaj oblikvaj ŝaktoj kun jara produktivo de 300,000 tunoj da karbo. Sed iu diris, ke por konstrui tiajn ŝaktojn oni bezonas minimume 1,000,000 juanojn. De kie oni havigos al si la kapitalon? De kie vinĉon, cementon kaj ŝtalan materialon? Kaj de kie profesiajn konstruantojn? La laboristoj kaj kadroj partoprenintaj en la restarigado de tiu minejo montris kelkajn favorajn kondiĉojn por konstrui la novajn ŝaktojn: Unue, en la larĝigado de tiu ŝakto, aro da laboristoj jam lerte posedis teknikon pri fosado de galerio; due, la jam restarigita ŝakto ĉiutage povas produkti pli ol 300 tunojn da karbo, kio signifas akumulon, kaj oni povos uzi ĝin por solvi la ŝlosilan problemon; kaj trie, ne estas modernaj ekipaĵoj, oni povas anstataŭigi ilin per simplaj.

Ju pli oni diskutas, des pli la vero klaras. La laboristaro de Gianggiavan kun revolucia sentimeco sin ekĵetis en la batalon por konstrui la novajn ŝaktojn. La projekta grupo konsistanta el kadro, laboristoj kaj teknikistoj elfaris la projekton nur en unu monato. Kaj ankaŭ 77 elektitaj ministoj tuj venis al la konstruejo kaj komencis la laboron.

Kiam la fosanta ŝakto atingis profundecon de 200 metroj, aperis fendo sur la plafono, el kiu forte ŝprucis akvo. Antaŭ la malfacilo la ministoj kaj kadroj firme diris: "Eĉ ĉielgrandan malfacilon ni venkos!" En frosta akvo ili klopodadis por ĉesigi kaj dreni la akvon kaj samtempe daŭrigis la fosadon. Nur en sep monatoj ili sukcesis konstrui paron da ŝaktoj profundaj respektive je 830 metroj per siaj akumulitaj 190,000 juanoj.



*Han Ĉengliang, sekretario de la partia komitato de Gianggiavan-karbominejo kune kun laboristoj kritikas Lin Biaŭ kaj Konfucion.*

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la laboristoj kaj kadroj de Gianggiavan-karbominejo, firme tenis la bazan linion de la Partio, senĉese kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj gajnis altajn produktojn unu post alia venkinte multajn malfacilojn.

Foje, brulis mem karbo en galerio. Densa fumo ruliĝadis, aero maldensiĝis kaj temperaturo atingis pli ol 60°C, kio minacis sekuron de la ŝakto. Disvolvante la revolucian spiriton **"timi nek malfacilojn nek morton"** la ministoj sin organizis en grupojn kaj sin ĵetis en la brulejon puŝante trametojn. Iuj el ili brulvundiĝis je la mano pro varmigitaj trametoj, sed ankoraŭ persistis en la posteno, aliaj falis sufokite de fumo, sed denove sin ĵetis en la batalon post rekonsciiĝo. Post luktado de tri tagnoktoj ili transportis la brulantan karbon el la ŝakto, kaj per tio protektis la ŝakton.

Dum fosado ili renkontis deklivon de 25-26 gradoj, sur kiu vinĉo estis ne taŭga pro alta deklivo kaj glitiga vojo, la ministoj do faris transportadon per puŝo de trametoj kaj tiel faris galerion longan je 80 metroj post pena laboro de 20 tagoj.

La produktokvanto de la novaj ŝaktoj plimultiĝis meznombre je 33.8% en ĉiu jaro, kaj en 1970 ĝia produktokvanto jam superis la projektan normon. Tiam iuj opiniis, ke pliprodukto bezonos novajn ŝaktojn, laboristojn kaj ekipaĵojn. Rilate al tiu opinio la partia komitato de la minejo organizis oficistojn kaj laboristojn serioze resumi la spertojn de la lastaj jaroj, foje-refoje studi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ **"La amaso estas vera heroo"** kaj **"sendependeco kaj memdecidemo, kaj sinapogo sur la propraj fortoj"**, kaj kritiki transcendentalismon de ideismo kaj reviziisman teorion pri produktaj fortoj, tiel ke ili komprenis, ke por disvolvi produktadon multe, rapide, bone kaj ekonomie, estas necese senĉese eltrovi la nunajn latentajn produktajn fortojn.

En la amasoj ekzistas la ekstreme granda socialisma entuziasmo. La teknika renoviga grupo, kun veteranaj laboristoj kiel ĉefa forto, levis tajdon de teknika renovigo subtenate de la oficistoj kaj laboristoj. Ĝi anstataŭigis puŝtrametojn per maŝinoj en transportado kaj homan manipuladon per duonmekanika en produktado de karbo, tiel ke la produkta efiko oble altiĝis.


La karbominejo jam plenumis la ŝtatan planon de la unua duonjaro antaŭdate je 55 tagoj, kaj nun la laboristaro plenenergie marŝas antaŭen strebante al nova nivelo de pliprodukto!

# Nova vojo de konstruado

ANTAŬE konstruado ofte impresis la homojn tiel: En kaj ekster la muroj de konstruaĵo staras densaj skafaldoj, kaj laboristoj streĉe faras masonadon per brikoj.

Sed nun, en la konstruejo de la kvina brigado de la Dua Konstrua Kompanio de Ŝenjang, aperas tute alia sceno: La tuta konstruejo estas kvazaŭ aera konstrua "laborejo". La "laborejo" ligas en tuton la manipulejon, ŝtalan muldilon por fari murojn, laborstablojn kun sekurigaj kaj lumigaj ekipaĵoj kaj hidraŭlikan levilaron. Laŭ la direktado signata de laboristo per ruĝa flago, gruo ŝutas skorian betonon en la multilon sitelegon post sitelego. Tiam manipulisto premas prembutonon kaj la hidraŭlika levilaro malrapide altigas la "laborejon". Samtempe ankaŭ la muro pli kaj pli altiĝas. Post pli ol 20 horoj la muroj de unua etaĝo estas pretigitaj. Samtempe kun tio plankoj, ŝtuparoj, balkonoj k.a. estas instalitaj. Kiam oni ekfaras la murojn de la dua kaj tria etaĝoj, aliaj jam komencas ekipi la unuan etaĝon per pordoj, fenestroj, elektra, vaporvarmiga kaj akvokonduka sistemoj. Lastatempe oni konstruis per tiu nova tekniko en du monatoj 6-etaĝan loĝdomon kun plankareo de pli ol 6,000 kvadrataj metroj. La respondeculo de la brigado diris, ke oni povas plie mallongigi la konstruan tempon, samtempe kun la senĉesa plibonigo de administrado kaj konstruaj maŝinoj.

La nova metodo aplikita de tiu konstrua brigado estas glit-forma konstrua tekniko. La praktiko montris, ke aplikante tiun teknikon oni povas rapidigi la konstruadon, ŝpari laborfortojn kaj malmultigi memkoston de la konstruaĵo, cetere la metodo garantias bonan kvaliton kaj sekurecon en




*Glit-forma tabulo estas leviĝanta.*

konstruado. Kompare kun ordinaraj metodoj la nova tekniko duone mallongigis la tempon de konstruado kaj laboron de ĉiu kvadratmetro kaj la kosto egalas al tiu per ordinaraj metodoj. La muro el skoria betono estas pli firma kaj pli supereca ol tiu el ruĝaj brikoj en varmkonservo kaj tertremelteno. Cetere tiu metodo povas malmultigi amasiĝon de industriaj forĵetaĵoj.

La glit-forma konstrua tekniko estas unu el la kompare avangardaj konstruaj metodoj en la mondo. De la metodo kunligi antaŭpreparitajn dompecojn, la nova tekniko diferencas per tio, ke ĝi havas kompleton da muldiloj kaj kombinas la antaŭpreparon de dompecoj kun ĉeloka ŝutado de betono, dank' al kio formiĝas rapida kaj kontinua mekanika laboro. En la lastaj kelkaj jaroj, la branĉoj de fundamenta konstruado de nia lando konstruis per tiu tekniko grandajn ferbetonajn olecisternojn, akvoturojn, fumtubojn, multetaĝajn domframojn kaj similajn industriajn konstruaĵojn, kaj en tio akiris certan sukceson kaj sperton. La kvina brigado de la Dua Konstrua Kompanio de Ŝenjang estas unu el la unuoj, kiuj kompare bone aplikas tiun novan teknikon al civilaj konstruaĵoj.

Dank' al hardo de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la laboristoj de la brigado ekhavis pli ardan revolucian entuziasmon. Ili decidis ŝanĝi la postiĝintajn metodojn en konstruado de nia lando. Sub la gvido de la partia organizo, oni starigis eksperimentan grupon de nova tekniko kun laboristoj kiel la ĉefa forto kaj partopreno de kadroj kaj teknikistoj. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ **"Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn por konstrui nian landon en socialisman modernan potencon en ne tre longa tempo"**, la grupanoj lernis progresintajn spertojn, apogis sin sur la amasoj kaj elhakis sian propran vojon per glit-forma konstrua tekniko en praktikado. Iuj diris, ke la nova tekniko estas malfacile aplikebla por civilaj konstruaĵoj kun granda areo kaj komplika strukturo. Sed la laboristoj ne ŝanceliĝis. Post pli-ol-unu-jara klopodo ili sukcesis apliki la novan teknikon kaj la kvalito de konstruaĵoj pli kaj pli boniĝis. Komence ili povis nur apliki tiun metodon en malgranda areo, sed poste en granda areo. Cetere formiĝis horizontala laborlinio inter diversaj laborspecoj kaj tridimensia interkruciĝa laboro, kio mallongigis la tempon de konstruado.

En la prova apliko de la nova tekniko la kvina brigado de la Dua Konstrua Kompanio de Ŝenjang akiris entuziasman subtenon de superaj gvidinstancoj kaj grandan materian kaj teknikan helpon de koncernaj frataj unuoj. La sukcesa apliko de la tekniko estas kristalo de la kolektiva saĝo de la laboristaro.



*Ŝenjang-aj konstruaj laboristoj konstruas etaĝan domon aplikante glit-forman konstruan teknikon.*




# Baj-nacio

de ZONG MIN

BAJ-NACIO havas 680,000 membrojn, el kiuj 80% dense loĝas en la gubernioj Dali, Erjuan, Junlong, Gianĉuan, Heking, Lanping k.a. sur la Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenaĵo.

Baj-nacio havas longan historion. Antaŭ 2,000 jaroj baj-oj jam vivis en Dali, Erhaj k.a. lokoj. Pro la progreso de la socia ekonomio kaj la reciproka aneksado de la regantaj klikoj, en Suj-dinastio (589-618 p. K.) formiĝis inter baj-oj 6 regnoj. En la 8-a jarcento, unu el la 6 regnoj venkis la aliajn kaj fondis sklavisman reĝlandon Nanĝaŭ. En la jaro 902, pro la opono de sklavoj, disfalis la sklavisma reĝimo kaj fondiĝis feŭdisma reĝlando Dali. En la jaro 1253 la regno Dali estis konkerita de Juan-dinastio (1271 — 1368 p.K.). En sia komenca periodo Ming-dinastio (1368 — 1644) abolis la reĝimon de klanaj estroj de baj-nacio kaj sendis tien siajn mandarenojn por regi. Ekde la dinastioj Juan kaj Ming, la politika kaj ekonomia stato de Junnan inkluzive la lokojn de baj-nacio estis preskaŭ sendiferenca de tiu de la landinterno.

En Dali kaj Erjuan koncentre loĝataj de baj-oj troviĝas densaj arbaroj, belaj montoj kaj riveroj. La monto Diancang kaj la lago Erhaj estas famaj pitoreskejoj. La regiono de baj-nacio kun la lago Erhaj kiel centro estas unu el la ĉefaj produktejoj de kotono kaj greno de Junnan-provinco. La Dali-a Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco havas multajn famajn produktaĵojn, ekzemple, la teo Tuo kaj briko da teo de Hiaguan, la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco, laktpulvoro kaj kondensita lakto de Dengĉuan, ŝinko de Heking, sekigita anseraĵo de Jongping, arkfiŝo (*Schizopyge taliensis*) de Erhaj-lago k.a. Cetere Dali produktas mondfaman Dali-an marmoron neĝblankan kun miksitaj bluaj, verdaj kaj palflavaj vejnoj, kiuj formas kvazaŭ bildon de montoj kaj riveroj en nebulo. La prilaborita marmoro estas delikata kaj belega ornamaĵo kaj debitata en kaj ekster la lando.

Prosperiĝo de ekonomio kaj kulturo de baj-nacio komenciĝis de la posta periodo de la 8-a jarcento. Tiam la reĝlando Nanĝaŭ havis siajn specialajn produktaĵojn — tranĉilon kaj glavon famajn pro akreco kaj en ĝia agrikulturo oni vaste uzis ferajn instrumentojn, kio markis la certagradan evoluintecon de metalurgio de baj-nacio. Cetere la reganta instanco de Nanĝaŭ kuraĝigis homojn entrepreni metion kaj difinis, ke metiistoj ne bezonas servi senpage al la ŝtato. Tiam oni jam komencis ekspluati oron, arĝenton, stanon, sukcenon kaj aliajn mineralojn. En la tempo de la reĝlando Dali baj-nacio plie progresis en produktado kaj konstruis multajn novajn urbojn, kie koncentriĝis industrioj kaj komerco. La urboj Jingŝeng, Liŝuj kaj aliaj fariĝis gravaj lokoj de komercado kun la landoj de la Hindoĉinia Duoninsulo.

La literaturo, muziko, pentrarto, arkitekturo k.a. de baj-nacio havas longan historion kaj atingis altan nivelon. La buŝa literaturo de baj-nacio estas saturita de spirito de batalo de baj-oj kontraŭ perfortaĵo. La fama *Bildrulaĵo de Nanĝaŭ* pentrita en la jaro 899 kaj la *Bildrulaĵo de Dali* en la jaro 1172 estas tre admirataj per sia vastega panoramo kaj alta nivelo de arto. La ŝtonaj statuoj en la kaverno en la monto Ŝibaŭ de Gianĉuan estas skulptitaj de baj-naciaj laboruloj, en la dinastioj Tang kaj Song. La statuoj estas kvazaŭ vivaj kaj plene montras la mirindan lertecon de baj-oj en skulptado. La Tri Pagodoj en la templo Ĉongŝeng en Dali, kiujn oni konstruis en la tempo de la reĝlando Dali, ĝis nun ankoraŭ staras fortike kaj impone. La ĉefa el la tri pagodoj altas 58 metrojn kaj havas 16 etaĝojn. Aparte menciinda estas ke la pagodoj restas ĝis nun ankoraŭ fortikaj post multfojaj detruaj tertremoj. Pro tio oni ne povas ne admiri la mirindan nivelon de baj-oj en arkitekturo. Nun la pagodoj kiel gravaj antikvaĵoj estas aparte zorgataj kaj protektataj de la ŝtato.



*Baj-nacia vendistino helpas virinojn elekti ornamaĵojn.*

Baj-oj havas kelkajn grandajn festojn "Sanjuegie", "Huobagie", "Jutanhuj" kaj "Ĵaŭsanling". La unuaj du nun estas grandiozaj festotagoj de diversaj nacioj en la Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco por fari komercadon kaj artan kaj sportan aktivadon. La festo "Sanjuegie" daŭras semajnon en Dali ekde la 15-a de la tria monato laŭ la luna kalendaro. "Jutanhuj" okazas ĉiun aŭtunon en Jutanpo, nordokcidente de la lago Erhaj. Dum la festoj svarmas diversnaciaj popolanoj por sin amuzi aŭ interŝanĝi diversajn materialojn. En 1972, la ĉiutagaj bezonaĵoj vendataj dum la festo "Sanjungie" en Dali atingis pli ol 8,000 specojn, el kiuj duono estas produktita de la subprovinco mem. La festo "Huobagie" okazanta ĉiujare en la 25-a de la sesa monato laŭ la luna kalendaro estas antaŭaŭtuna festo de la baj-nacia popolo por beni agrikulturon, homojn kaj brutojn. "Ĵaŭsanling" origine estis ceremonio por memori la heroojn de la baj-nacia popolo, sed nun jam fariĝis festo de kantado kaj arta kaj sporta aktivado.

La Liberiĝo en 1949 radikale ŝanĝis la fizionomion de baj-naciaj lokoj. Nelonge post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la baj-nacia popolo kondukis demokratian reformon, abolis feŭdan posedsistemon de agroj, efektivigis agrikulturan kolektivigon kaj socialisman reformon al metioj, kapitalismaj industrioj kaj komerco. En 1956, sub la brila lumo de la politikoj de la Partio pri nacimalplimultoj, fondiĝis la Dali-a Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco, dank' al kio plie efektiviĝis la egala rajto inter baj-oj kaj aliaj nacioj en la subprovinco. En la jaro 1958, por rapide ŝanĝi la postiĝintan fizionomion, la baj-nacia popolo kaj la popolo de la tuta lando kune levis altan tajdon de impeta produktado kaj efektiviĝis samtempe popolkomunumigo en la kamparo.

Depost la Liberiĝo, la vasta laboranta popolo de baj-nacio faris fundamentajn konstruojn en industrioj kaj agrikulturo, kaj akiris grandajn sukcesojn, plene utiligante siajn proprajn fortojn por batali kontraŭ malfaciloj. Nun Hiaguan, la ĉefurbo de la subprovinco, jam fariĝis industria centro de la loko kaj grava industria urbo de okcidenta Junnan. Multaj gubernioj de la loko fondis siajn industriojn de elektro, karbo, metalurgio, kemio, maŝinfabrikado, arbohakado k.a. En 1970 la nombro de fabrikoj kaj minejoj pligrandiĝis 27-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Nun la totala produktovaloro de industrioj de la subprovinco kreskis preskaŭ duoble kompare kun tiu de la jaro 1966.

Post la popolkomunumigo la superecoj de la socialisma kolektiva ekonomio estis pli vaste disvolvitaj. En la amasa movado de lerno de Daĝaj, la baj-nacia popolo klopodas per pli granda entuziasmo por gajni bonan rikolton de agrikulturo. En la pasinteco la agrikulturo de baj-naciaj lokoj restis en malevoluinteco kaj havis nenian modernan agrikulturan maŝinon krom antikvaj plugiloj, ŝpatoj k.s. Nun la tuta subprovinco havas pli ol 8,500 maŝinojn por plugado, rikoltado, prilaborado k.c., kiuj multe malpezigis la laboron de kamparanoj kaj rapidigis la disvolvon de agrikulturo. Nun en la subprovinco funkcias 15 eksperimentaj stacioj de agrikulturo kaj 117 disvastigaj stacioj de agrikultura

scienco kaj tekniko. Jam formiĝis la agrikultura scienca-teknika reto de 4 niveloj de gubernio, komunumo, produkta brigado kaj produkta grupo. Kun la iom-post-ioma efektivigo de mekanikigo kaj senĉesa disvastigo de agrikultura scienco-tekniko, jaron post jaro altiĝas la produktokvanto de greno de la subprovinco, kaj en 1972 ĝia totala produktovaloro de agrikulturo estis 172.9% de tiu en 1965.

Samtempe kun la rapida disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, ankaŭ la kultura, eduka kaj higiena aferoj multe progresis. La nunaj nombroj de lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj respektive kreskis 7-10-oble kompare kun tiuj en la jaro 1949. Antaŭe en la baj-naciaj lokoj la medicinaj kondiĉoj estis tre malbonaj kaj ofte cirkulis infektaj malsanoj. Post la Liberiĝo oni fondis multajn kontraŭmalsanajn organizojn kaj diversajn higienajn instituciojn, dank' al kiuj kelkaj el infektaj malsanoj estis jam eliminitaj kaj aliaj bremsataj. En la tuta subprovinco la nombro de hospitaloj kaj sanitarejoj kreskis de 37 en la jaro 1952 ĝis 283, kaj la nombro de malsanulaj litoj kreskis je 89.9% kompare kun tiu en la jaro 1965.

Kun la pli profunda disvolvo de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la industrioj, agrikulturo, kultura, eduka kaj higiena aferoj progresas rapide. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la baj-nacia popolo entuziasme konstruas sian patrion en prosperan kaj potencan.



*Baj-nacia komunumanino en fiŝkaptado*

*Fiŝista vilaĝo ĉe la lago Erhaj en la Dali-a Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Junnan-provinco*



HUANG ŜUZE*:

# Problemo pri monda loĝantaro

## I. FUNDAMENTA TAKSO PRI LA NUNA STATO DE LA MONDA LOĜANTARO

En la lastaj kelkdek jaroj, kun la disvolviĝo de la monda politika kaj ekonomia situacio, rapide kreskas la loĝantaro en la mondo, precipe en la tria mondo. La tria mondo nun havas loĝantaron de ĉ. 3,000,000,000, kiu estas pli ol 70% de la monda loĝantaro. Kiel ĝuste rigardi tiun ĉi fakton estas la unua afero, kiun ni devas klarigi. Iu superpotenco publike asertas, ke "loĝantara eksplodo" okazas en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj ke "katastrofo al homaro" baldaŭ falos. La alia superpotenco, kiu pretendas esti kontraŭa al maltusanismo en iuj konferencoj, funkciigas tamen siajn propagandilojn kriante: "Rapida kresko de loĝantaro estas muelŝtono ĉirkaŭ la kolo de la evoluantaj landoj." Kantante dueton, la du superpotencoj energie klopodas por priskribi la loĝantaran kreskon de la tria mondo kiel malbonegan aferon. Se tiu absurdaĵo estas ne refutita, do ne troviĝos ĝusta elirpunkto en la diskutado pri la problemo de la monda loĝantaro.

El ĉiuj aferoj en la mondo, homo estas la plej valora. Se nur la popolanoj tenas sian sorton en siaj manoj, ili do povos krei miraklojn. Homo, kiel laboranto kaj kreinto kaj uzanto de produktaj instrumentoj, estas la decida faktoro en la sociaj produktaj fortoj. Homo estas unue produktanto kaj nur due konsumanto. La bravaj, laboremaj kaj saĝaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko iam faris elstarajn kontribuojn en la historio por civilizacio de la homaro. Sed dum la pasinta sufiĉe longa periodo la koloniistoj kaj imperiistoj sovaĝe invadis kaj sklavigis la landojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ili ne nur forrabis de tiuj landoj multe da sociaj riĉaĵoj, sed ankaŭ faris homvendon, forpelon kaj masakradon al la lokanoj. Pro tio sola Afriko perdis 100,000,000 homojn. La sociaj produktaj fortoj de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj estis grave detruitaj. La loĝantaro de iuj landoj kaj nacioj draste malpliiĝis, kaj vasta areo de kampoj dezertiĝis. Post longdaŭra brava batalo fare de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, granda nombro da landoj en tiuj regionoj gajnis unu post alia sendependecon en politiko kaj akiris rimarkindan progreson en disvolvo de siaj naciaj ekonomio kaj kulturo kompare kun la pasinteco, kaj krom tio ankaŭ la loĝantaro kreskis relative rapide. Tio estas afero tute ne malbona, sed bonega. En la situacio de "granda malordo tra la mondo", en kiu la vastaj popolamasoj ĉiam pli vekiĝas, la granda nombro da loĝantoj de la tria mondo formas gravan kondiĉon por pluapaŝe fortigi la batalon kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj rapidigi la disvolviĝon de socio kaj ekonomio. Nun la popoloj de la tria mondo jam fariĝis ĉefa forto de batalo kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo kaj fariĝas ĉiam pli potenca forto en protekto de nacia sendependeco kaj disvolvo de nacia ekonomio.

Estas menciende, ke en sia antaŭenmarŝado la tria mondo ankoraŭ vizaĝas al multaj malfaciloj kaj devas persisti en la batalado por venki ilin. En multaj landoj, kiuj gajnis sendependecon en politiko, iliaj ekonomiaj arterioj estas ankoraŭ regataj de koloniismo kaj imperiismo, kaj la malnova ekonomia strukturo estas ne fundamente ŝanĝita. Precipe,

pro pli intensa ekspluato kaj subpremo de la du superpotencoj, tiuj landoj ne povas plene utiligi sian vastan homfortan fonton, kaj ankoraŭ ekzistas tie malriĉeco kaj senlaboreco. Sed, ni konvinkiĝas, ke nerezistebla estas la historia tendenco — landoj volas sendependecon, nacioj volas liberiĝon kaj la popoloj volas revolucion. Kiaj ajn zigzagoj kaj malfaciloj povas esti sur ilia antaŭenmarŝa vojo, la fina venko certe apartenos al la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo. Sur la bazo de senĉesa batalo kontraŭ la agreso, interveno, renverso kaj prirabado de imperiismo kaj hegemoniismo kaj persista defendo de sendependeco en politiko kaj ekonomio, certe naskiĝos Azio, Afriko kaj Latinameriko kun multa loĝantaro, abundaj produktoj, feliĉa vivo kaj prospera kulturo.

Antaŭ pli ol 170 jaroj, kiam la loĝantaro de la mondo ankoraŭ ne atingis miliardon, la famaĉa Maltuso kriaĉis pri "superloĝateco" kaj ke la kresko de produkto neniam atingos tiun de la loĝantaro. Li diraĉis ankaŭ, ke eĉ kun "la plej bone direktataj penoj de homa diligenteco", Ĉinio malfacile povus "duobligi la produkton ... en iu ajn nombro da jaroj". Hodiaŭ la monda loĝantaro havas pli ol kvar-oblon de tiu de la tempo de Maltuso, sed la sociaj riĉaĵoj pli alte kaj pli multe kreskas dank' al la klopodoj de la vastaj popolamasoj en venko de multaj obstakloj. En pli ol dudek jaroj post sia fondiĝo, la Ĉina Popola Respubliko jam multoble kreskigis siajn produktaĵojn. La kreiva forto de la popolo estas senlima, tia estas ankaŭ la kapablo de la homoj por ekspluati kaj utiligi naturajn riĉfontojn. La pesimismaj vidpunktoj propagandataj de la superpotencoj estas absolute senbazaj kaj kun kaŝitaj motivoj.

## II. PRI LA KAŬZOJ KAJ SOLVAJ RIMEDOJ DE LA LOĜANTARA PROBLEMO

Nun en multaj landoj de la mondo ekzistas loĝantara problemo, kiu konkrete prezentiĝas en senlaboreco, malriĉeco, malsateco kaj alta mortoprocento k.a. Certiĝi pri kaŭzo de tiu problemo kaj trovi rimedojn por ĝin solvi devas esti la centra tasko de nia diskutado en tiu konferenco.

La loĝantara stato de iu lando estas decidita de ĝia socia sistemo kaj la politika kaj ekonomia kondiĉoj en- kaj ekster-landaj. Ĉu senlaboreco kaj malriĉeco en multaj landoj de la hodiaŭa mondo estas kaŭzitaj de superloĝateco? Ne, tute ne. Tio estas kaŭzita ĉefe de agreso, prirabo kaj ekspluato de imperiismoj, precipe de la superpotencoj. La du superpotencoj estas la plej grandaj internaciaj ekspluatantoj kaj subpremantoj en la nuna tempo kaj ankaŭ la ĉefaj krimuloj kaŭzantaj senlaborecon kaj malriĉecon de la mondo. La Deklaracio pri la Starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN en ĝia Sesa Speciala Sesio montras, ke la plilarĝiĝanta breĉo inter landoj evoluantaj kaj evoluintaj estas kaŭzita de la malnova internacia ekonomia ordo kiu ĉiam pli intensigas la malegalecon, kaj ke eksterlandaj regado kaj okupo, koloniismo, rasa diskriminacio, rasa apartigo kaj nova koloniismo en ĉiuj formoj estas la plej grandaj obstakloj por la plena emancipiĝo kaj progreso de la evoluantaj landoj. Ni opinias, ke la primara rimedo por solvi la loĝantaran problemon estas batali kontraŭ la agreso kaj prirabado de imperiismoj, novaj kaj malnovaj koloniismoj, precipe la superpotencoj, frakasi la neegalajn internaciajn ekonomiajn rilatojn, akiri kaj protekti la nacian sendependecon, disvolvi la naciajn ekonomion kaj kulturon sendepende kaj sinapoge sur propraj fortoj laŭ specialaj kondiĉoj kaj diferencaj cirkonstancoj de ĉiu ajn lando kaj altigi la vivnivelon de la popolo.

Kiel ĉiuj scias, ke ankaŭ en la superpotencoj ekzistas granda nombro da relative superfluaj loĝantoj kaj plivastiĝanta malriĉeco. En iu superpotenco estas milionoj da senlaboruloj kaj dekmilionoj da homoj vivas en mizero, kaj en la alia kun la ŝildo de socialismo, la diferenco de malriĉeco kaj riĉeco inter privilegia tavolo kaj laboranta popolo fariĝas ĉiam pli granda, la burokrataj monopolaj kapitalistoj arbitre eksigas laboristojn tiel ke la vivo de la vastaj amasoj de laboristoj estas negarantiata. Tio estas tute la rezulto de ilia kruela ekspluatado kaj subpremado, kiujn la superpotencoj praktikas enlande.

En la lastaj jaroj, forte leviĝas la batalo de la tria mondo kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo, kaj la batalo de la popoloj de la evoluintaj landoj kaj la superpotencoj kontraŭ kruela subpremo kaj ekspluato kreskas senĉese. La du nerezisteblaj grandaj tajdoj en kunfluiĝo ĉiam pli profunde detruas kaj skuas la bazon de imperiismo kaj hegemoniismo kaj per tio malfermis la vojon por elradikigi senlaborecon kaj malriĉecon en la mondo.

La du superpotencoj tre timas tion, ke la vera kaŭzo de senlaboreco kaj malriĉeco estos malkovrita kaj ke la vastaj popolamasoj klare konos la

ĝustan rimedon por solvi tiun ĉi problemon. Ili fabrikis diversajn absurdaĵojn kiujn ili dissemas ĉie.

"Superloĝateco estas la kaŭzo kial la senhavaj landoj estas malriĉaj." — Jam estas ofte ripetada malnova tono de la superpotencoj. Ili tiel multe kalkulis por pruvi tion ke loĝantaro estas tro multa, nutraĵoj tro malmultaj kaj naturaj riĉfontoj nesufiĉaj, sed ili neniam kalkulis kiom da naturaj riĉfontoj ili forrabis, kiom da sociaj riĉaĵoj ili forprenis kaj kiom da superprofitoj ili elprenis el Azio, Afriko kaj Latinameriko. Nur se oni faros konton pri ilia ekspluato, la vera kaŭzo de la loĝantara problemo tuj povos esti klara. Ankaŭ ilia amaso da loĝantaraj statistikoj povos neniom ilin helpi. La meznombra loĝateco al ĉiu kvadrata kilometro estas nur 12 en Afriko, kaj 15 en Latinameriko. Kvankam la loĝdenseco de la evoluantaj landoj de Azio estas relative granda, ĝi tamen restas malpli alta ol tiu de la evoluintaj landoj en okcidenta Eŭropo. Kiel do oni povas diri, ke malriĉeco de malriĉaj landoj estas kaŭzita de superloĝateco? Ili diris, ke malaltigo de la procento de homkresko povas solvi malriĉecon. Se estas tiel, kial sin trovas ankoraŭ tiel multaj senlaboruloj kaj malsatuloj en la du superpotencoj, kie la homkresko estas relative malrapida kaj loĝdenseco malgranda?

"Nur ekonomia disvolviĝo kun mia helpo povas solvi vian loĝantaran problemon." — Tio estas artifiko de la social-imperiismo. Kompreneble por solvi malriĉecon kaj loĝantaran problemon oni devas disvolvi ekonomion. Sed, la t.n. "ekonomia disvolviĝo" povas esti nur trompo, sen batalo kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj sen ŝanĝo de neegalaj internaciaj ekonomiaj rilatoj. Ĉu vi tiel emfazas pri "ekonomia disvolviĝo"? Kial do vi kolere eksaltis je mencio pri starigo de nova internacia ekonomia ordo? Kial vi provas ĉiarimede protekti la malnovajn internaciajn ekonomiajn rilatojn kaj malhelpas la ekonomian disvolviĝon de la tria mondo? Vi tiel emfaze parolas pri "helpo", sed kial vi rikoltas grandan profiton, senkompate devigas pagi ŝuldon kaj praktikas ĉantaĝon utiligante alies malfacilojn? En puŝado de novkoloniismo vi jam superis la alian superpotencon. Via t.n. "helpo" povas nur intensigi viajn regadon kaj prirabadon al la landoj de la tria mondo kaj gravigi ilian senlaborecon kaj malriĉecon.

"La superloĝateco de la evoluantaj landoj minacas la sekurecon de la mondo." — Tio estas tute falsa akuzo kiu konfuzis nigron kun blanko. Oni volas demandi, ĉu militoj okazintaj en Hindoĉinio, Mezoriento kaj aliaj regionoj, kaj armita okupiteco al Ĉehoslovakio estas kaŭzitaj de superloĝateco? Ĉu la justaj militoj de subpremataj nacioj kaj popoloj por gajni sendependecon kaj liberiĝon estas kaŭzitaj de superloĝateco? Ne. Agresa milito estas lanĉita de imperiistoj, precipe de la superpotencoj, dum la subpremataj nacioj kaj popoloj estas devigitaj de imperiismo, koloniismo kaj nov-koloniismo preni armilojn por rezisti kontraŭ agreso kaj batali por liberiĝo. Ĉiutage la du superpotencoj krias "paciĝon", sed fakte faras intensigon; kaj ĉiutage ili krias "malarmadon", sed efektive faras armadekspansion. Kie la du superpotencoj batalas, tie ne estas trankviliĝo. Ke ili intencas imputi la krimon minaci sekurecon de la mondo al la tria mondo, tio povas nur pli profunde malkaŝi ilian malicon.

La serioza stato de senlaboreco kaj malriĉeco en la malnova Ĉinio estas de ĉiuj konata. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo, post longdaŭra batalo, renversis la "tri grandajn montojn" de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo pezantajn sur sia kapo, faris la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, kaj en relative mallonga tempo sukcesis elimini la senlaborecon postlasitan de la malnova Ĉinio. En pli ol dudek jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko, kvankam la ĉina loĝantaro kreskis je 60%, de ĉ. 500,000,000 ĝis ĉ. 800,000,000, sed dum la sama tempo, la produktokvanto de greno kreskis je pli-ol-unu-oblo, de 110,000,000 tunoj ĝis pli ol 250,000,000 tunoj, kaj ankaŭ la produktokvanto de ŝtofo kaj aliaj industriaj produktaĵoj kreskis multoble. Nun, la kulturata areo de nia lando okupas nur iom pli ol 10% de ĝia totala teritorio. Kun grandaj latentaj fortoj ankoraŭ multaj terpecoj povas esti ekspluatataj, kaj la pohektara produktokvanto ankoraŭ povas esti plialtigata. Nuntempe kvankam la vivnivelo de nia popolo restas ankoraŭ relative malalta, tamen ĉiu jam havas laboron, manĝon kaj veston, kaj la vivo de la popolo iom post iom pliboniĝas. La vasta amaso de la ĉina popolo neniam havas tiel altan entuziasmon kaj kreivon kiel nun. En la socialisma konstruado, nia grandega homforto estas laŭplane kaj racie utiligata. La historiaj faktoj de Ĉinio komplete refutis diversajn absurdaĵojn fabrikitajn de la superpotencoj en la loĝantara problemo kaj plene pruvis **"la veron ke revolucio plus produktado povas solvi la problemon de manĝado"** elmetitan de Prezidanto Maŭ Zedong.

## III. PRI ELLABORO KAJ PLENUMO DE LOĜANTARA POLITIKO

Ni emfazas batalon kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj disvolvon de la naciaj ekonomio kaj kulturo kiel primaran rimedon por solvi loĝantaran problemon, tio tamen neniom signifas ke ni opinias la loĝantaran politikon senutila. Ĉi tie ni volas antaŭ ĉio montri, ke la ellaboro kaj plenumo de la loĝantara politiko, la difino de loĝantara normo, la ĝenerala popolnombrado kaj publikigo de ĝiaj statistikoj, ĉio ĉi tio tute estas internaj aferoj kaj suvereneco de diversaj landoj, kiuj devas esti deciditaj de ĉies registaro laŭ la speciala stato de la lando. Iuj landoj bezonas iom malaltigi la homkreskan procenton, kaj aliaj bezonas altigi ĝin. Ĉar la statoj de diversaj landoj estas malsamaj, oni ne devas altrudi al ili la samecon. La internaciaj teknikaj kunlaboro kaj helpo pri loĝantaraj aferoj devas sekvi la principojn de kompleta volonteco de koncernaj flankoj, rigora respekto al ŝtata suvereneco, sen ĉiaj ajn aldonitaj kondiĉoj kaj favorigo al sinapogo sur propraj fortoj de la ricevantaj landoj. Ni firme oponas, ke la superpotencoj intervenas per diversaj rimedoj en la loĝantaran politikon de aliaj landoj sub la preteksto de la t.n. "loĝantara eksplodo" kaj "superloĝateco". Ni firme oponas, ke iuj internaciaj organizoj malrespektas la suverenecon de helporicevantaj landoj per aldonitaj kondiĉoj por limigi ilian loĝantaran kreskadon en sia helpado.

Renversinte la regadon de imperiistoj kaj iliaj lakeoj, Ĉinio ekhavis kondiĉojn tiel por laŭplane disvolvi la nacian ekonomion kiel por laŭplane reguligi la procenton de homkresko. Sur la bazo de energia disvolvo de produkto kaj altigo de la popola vivnivelo, Ĉinio disvolvas medicinajn kaj higienajn servojn ĝenerale en la urboj kaj vilaĝoj, fortigas la sanitaran laboron por patrinoj kaj infanoj, tiel ke ni reduktigis la mortadon unuflanke kaj reguligis la naskan procenton per laŭplana infannasko aliflanke. Nia laŭplana infannasko estas ne nur naskoregado, kiel iuj diris, sed ĝi ampleksas diversajn rimedojn por diversaj cirkonstancoj: En dense loĝataj lokoj, malfrua geedziĝo kaj naskoregado estas aplikataj sur la bazo de propra volonteco, sed aktiva kuracado estas donata en kazoj de sterileco; en maldense loĝataj regionoj de nacimalplimultoj kaj aliaj lokoj oni prenas metodojn favorajn al homkresko, sed ankaŭ helpas tiujn, kiuj havas tro multajn infanojn kaj volas naskoregadon. La politiko de laŭplana homkresko favoras ĝisfundan emancipiĝon de virinoj kaj edukon al postaj generacioj kaj ankaŭ konstruadon de la ŝtato kaj nacian prosperiĝon. Nun la morta procento en Ĉinio jam multe reduktiĝis. La naska procento en dense loĝataj regionoj malaltiĝis en diversaj gradoj. En la regionoj de nacimalplimultoj, ŝanĝiĝis la stato de tre malrapida kresko kaj eĉ abrupta reduktiĝo de loĝantaro kaŭzitaj de la kruela persekuto de la reakciaj fortoj en la pasinteco, kaj rapide kreskas la loĝantaro.

Ĉinio estas evoluanta socialisma lando kaj apartenas al la tria mondo. La ĉina popolo firme staras ĉe la flanko de la landoj de la tria mondo kaj ĉiuj subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj, fortigante unuiĝon kun ili en komuna batalado. Ni firme subtenas la popolojn de la tria mondo en ilia justa batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo, rasismo, zionismo kaj hegemoniismo por protekti la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon, disvolvi nacian ekonomion kaj starigi novan internacian ekonomian ordon. Ni firme subtenas la ĝustan starpunkton de la tria mondo kaj aliaj landoj koncerne al decido de la loĝantara politiko laŭ propra volo kaj konkreta stato. Ni tute konvinkiĝas, ke persistante en unuiĝo kaj batalo, la tutmonda popolo certe forigos ĉiujn ĝenojn, gajnos novajn venkojn paŝo-post-paŝe kaj kreos senlime brilan estontecon.

---

**Huang Ŝuze estas estro de la Ĉina Delegacio al la Monda Loĝantara Konferenco de UN. La artikolo estas mallongigo de lia parolado en la plena kunveno en la 21-a de aŭgusto.*

## Kurantaj Aferoj

### NIA LANDO RAPIDE KAJ BONE ASFALTAS VOJON

Puŝate de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la pavimistoj kaj komunumanoj-vojkostruantoj de nia lando senĉese plibonigas la teknikon de asfaltado kaj altigas efikecon. La tasko de la unua duonjaro estis plenumita, kaj ankaŭ tiu de julio superplenumita kun pli bona kvalito. Ĉijare la asfaltitaj vojoj de Hebej kaj Junnan estas plimultaj respektive je 15% kaj 68% kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro, kaj iuj regionoj jam plenumis pli ol 70% de la jara tasko ĝis julio.

### ŜANHAJO PRODUKTIS SUNAJN FORNOJN

Sub la helpo de koncernaj unuoj, la Ŝanhaja 15-a Radioaparata Fabriko produktis la unuajn ombrelformajn sunajn fornojn kaj jam sendis ilin al diversaj lokoj por prova uzo.

La forno similas al streĉita ombrelo inversigita. Ĝi konsistas el ombrelforma reflektoro, apogilo kaj kaldronejo malmunteblaj.

En 1954 kaj 1958 laboristoj kaj teknikistoj de ŝanhajaj koncernaj unuoj esploris, kiel utiligi la energion de la suno kaj faris kelkspecajn tiajn aparatojn. Sed pro la alta memkosto la esplorado estis ĉesigita. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la laboristoj kaj kadroj kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en administrado de entreprenoj, kiel "profito estas la unua", daŭre esploris sunenergiajn aparatojn. Post ripetada eksperimento oni trovis pli taŭgajn materialojn por reflektoro kaj fine elfaris tre utilan sunenergian fornon. Kaj en tri monatoj ili produktis 1,000 tiajn fornojn.

Prova uzado montris: En temperaturo de 24 gradoj C, en 20 minutoj oni povas boligi 3 kg. da akvo kaj en 15 minutoj pretigi 1 kg. da rizo. Kamparanoj-uzantoj diris, ke la tempo bezonata de kuirado sur tia forno estas preskaŭ sama al tiu sur karboforno, cetere la uzado estas oportuna kaj ekonomia.

### GASSENTIVAJ TRANSISTORAJ PECOJ

Sciencaj laborantoj de la Gilin-a Instituto de Aplikita Kemio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj laboristoj de la Elektronika Eksperimenta Fabriko de Liaŭjuan kune elfaris gassentivajn transistorajn pecojn. Ili estas faritaj el transistoraj materialoj sentivaj al brulema kaj eksplodema gaso. Per tiaj pecoj oni povas fari diversajn ekzamenajn aparatojn por ekzameni kaj analizi bruleblan gason, doni fajran alarmon kaj preventi malpurigon de la aero. Ili estas vaste uzata ankaŭ en industrioj de petrolo, karbo, kemio, elektro, en telekomuniko kaj popola vivo. Nun kelkaj prototipoj de tiaj aparatoj estas fabrikitaj kaj prove uzataj, kaj trovis bonvenon pro sia bona kvalito.

### MULTA KRESKO DE DEPONO DE ŜPARMONO DE NIA LANDO


Kun la vigla disvolviĝo de nia nacia ekonomio ankaŭ la popola vivo senĉese pliboniĝas kaj multe kreskas la depono de ŝparmono en la urboj. En la unua duonjaro la sumo de deponita mono de la urboj de la tuta lando atingis la plej altan nivelon depost la fondiĝo de la lando, kaj la neta kresko estas 189% de tiu de la tuta 1973. La sumo de la deponita mono en multaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj multe superis tiun en la sama periodo de la pasinta jaro.


GUJ HJUAN:

# Nova fizionomio de Gujlin


GUJLIN en nordorienta parto de la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono estas antikva urbo kun historio de pli ol 2,000 jaroj en la sudo de nia lando. Pro la ĉarmaj akvoj kaj mirindaj montpintoj, oni jam delonge diris ke "la montoj kaj akvoj de Gujlin estas la plej belaj en la tuta lando".

*Novaj fabrikoj kaj loĝdomoj en Gujlin*





*Drilmaŝinoj faritaj de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Gujlin*



*Laboristinoj ekzamenas la kvaliton de Sanhua-vino.*

Post la Liberiĝo, sub zorgema administrado de la laboranta popolo — mastro de la ŝtato, Gujlin fariĝis pli bela. Tre multaj turistoj el diversaj lokoj de nia lando kaj de la mondo vizitas ĝin en ĉiu sezono. Ili diris: "Gujlin vere similas mirindan kolorpentraĵon!"

## LA URBO EN VERDO

Veturante suden 33 horojn per la internacia trajno de Pekino ĝis Hanojo, oni povas atingi Gujlin.

En Gujlin oni kvazaŭ vivas en aroma mondo plena de floroj kaj arboj. Ĉu apud lago aŭ rivero, ĉu sur montdeklivoj aŭ en kortoj, ĉu sur trotuaroj eĉ de la centra kvartalo de la urbo, ĉie aromas osmantoj.

Gujlin signifas en la ĉina lingvo osmantaron. Tio jam montras, ke ĝi estas unu el la regionoj abunde produktantaj osmantojn de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo, Kuomintango zorgis nur subpremadon kaj ekspluatadon al la popolo kaj japanaj agresantoj faris detruadon, tial osmantoj de Gujlin estis preskaŭ tute ruinigitaj. Gujlin, la urbo de osmantaro, portis tiam nur vanan nomon. Post la Liberiĝo, la popola registaro faris planon por verdigi la urbon kaj disvolvis amasan movadon por kulturi kaj planti osmantojn. De pli ol 20 jaroj, la urbanoj plantis pli ol 900,000 osmantojn inter kiuj estas ora osmanto (*Osmanthus aurantiacus*) kun oranĝaj floroj, arĝenta osmanto (*Osmanthus fragrans*) kun helflavaj floroj, kvar-sezona osmanto, kiu ĉiam floras en kvar sezonoj, kaj multaj aliaj specoj. En la sezono, kiam osmantoj prospere floras, la fame konata pejzaĝa urbo Gujlin forte altiras turistojn per sia aparta aromo de tiuj arboj.

## MIRINDAJ MONTOJ KAJ BELAJ AKVOJ

Laŭ konstato de geologoj, antaŭ ducent milionoj da jaroj, la regiono de Gujlin estis vasta maro, en kies fundo sedimentiĝis kalkaj rokoj kun diversaj dikecoj kaj formoj. Poste, pro movado de terkrusto, la vasta maro malaperis, la marfundo emerĝis kiel tero kaj la kalkaj rokoj elstariĝis kaj iom post iom formiĝis en la nunan mirindan aspekton post longtempa erozio de pluvoj kaj ventoj.

En Gujlin plejparto de la montoj izolite elstaras sur ebenaĵo. Ekzemple, la fame konataj montoj Duhiufeng, Fuboŝan, Fengdongŝan k. a. ĉiuj estas izolitaj ŝtonaj montpintoj kaj rekte leviĝas. La diversformaj montoj ricevis sian nomon respektive laŭ sia formo, ekzemple, Elefantrostra Monto, Maljunula Monto, Koka Monto kaj Tura Monto. Krome, la plej alloga estas tio, ke multaj montoj havas diversajn kavernojn grandajn kaj malgrandajn, el kiuj unuj pendas ĉe monttalioj kaj aliaj kaŝas sin ĉe montpiedoj. Kihingjan de la monto Putuoŝan estas tre granda kaverno kun longeco de 1—1.5 kilometroj kaj kun malsamaj larĝeco kaj alteco en diversaj partoj. Ĝia plej granda parto estas kvazaŭ halo, en kiu troviĝas multaj naturaj stalaktitoj kun diversaj strangaj formoj. Ludijan de la monto

Guangminŝan estas granda kaverno trovita post la Liberiĝo. Ĝia aspekto estas tre ĉarma, tial oni nomas ĝin "palaco de natura arto".

En la regiono de Gujlin troviĝas multaj riveroj, el kiuj la plej granda estas Ligiang. Ĝia blua akvo estas tiel klara, ke oni povas vidi ĝian fundon. La montpintoj arbare starantaj ĉe ĝiaj ambaŭbordoj speguliĝas en la akvo, tial ĝia pejzaĝo estas aparte rava. La akvovojo de Gujlin ĝis Jangŝuo longas je 83 kilometroj kaj tiu loko estas la plej fama pitoreskejo de Gujlin.


## NOVE EMERĜINTA INDUSTRIO


Gujlin nun jam transformiĝis de konsuma urbo en la industrian kaj en ĝi aperis iuj modernaj malpezaj kaj pezaj industrioj.

En magazenoj de Gujlin, oni povas vidi diversajn industriajn produktaĵojn, el kiuj multaj estas la lokaj, ekzemple, silkaĵoj kaj kotonteksaĵoj kun desegnoj de Gujlin-aj vidindaĵoj, ladmanĝaĵoj de marko "Hiangŝan", pneŭmatikoj de aŭto, pumpiloj, elektraj motoroj, mezuriloj, transistoroj, medikamentoj, diversaj pilkoj kaj infanaj ludiloj . . .

Antaŭ la Liberiĝo, Gujlin havis nur kvar fabriketojn funkciigitajn de burokratoj kaj iujn metiejojn kun pli ol 300 laboristoj. Ni prenu tiaman akvan kaj elektran kompanion kiel ekzemplon. Ĝi havis nur tri importitajn generatorojn, el kiuj la plej granda entenis elektrokapaciton nur de 500 kilovatoj. Ĝia elektra linio estis malpli ol ok kilometroj, kaj servis nur al burokratoj, bienuloj kaj kapitalistoj, sed neniam al laborantaj popolanoj. Post la Liberiĝo, en Gujlin fondiĝis pli ol 200 grandaj kaj malgrandaj fabrikoj de ferŝtalo, mekanikaĵoj, kaŭĉukaĵoj, teksaĵoj, kemiaĵoj, elektroniko, paperfarado, manĝaĵoj, kuraciloj kaj medikamento kaj aliaj. La nombro de laboristoj plimultiĝis je kelk-oblo. Nun la elektra kvanto liverata en du tagoj egalas tiun de la tuta jaro en 1949. Elektra linio etendiĝas de ĉiuj kvartaloj ĝis la antaŭurboj kaj la gubernioj Linguj, Lingĉuan, Hin-an k.a. kaj plilongiĝis

*Taŭhua-rivero de Gujlin*





*Belaj montoj*

je 110-oblo ol tiu antaŭ la Liberiĝo. La elektro liverata al la industrio okupis pli ol 80% de totala elektrokvanto. En la jaro 1973, la totala industria produktovaloro de la tuta urbo kreskis je 224-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo post Liberiĝo, kaj je 3.5-oblo kompare kun tiu de 1965, la jaro antaŭ la granda kultura revolucio.

La kaŭĉuka industrio estas unu el la industrioj nove disvolvitaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Antaŭ la jaro 1965, tie troviĝis malgranda kaŭĉuka fabriko produktanta nur kaŭĉukajn ŝuojn kaj aliajn malgrandajn tagbezonaĵojn. Nun oni ne nur plivastigis la fabrikon, sed ankaŭ nove konstruis pneŭmatikan fabrikon, gumlaborejon, fabrikojn de kaŭĉukaĵoj kaj kaŭĉukfaraj maŝinoj. Krome, oni starigis tie projektan instituton pri kaŭĉukaĵoj kaj pneŭmatikan instituton. Gujlin nun jam povas produkti pli ol 100 specojn da kaŭĉukaj produktaĵoj.

Ankaŭ iuj tradiciaj produktaĵoj kun tieaj karakteroj, ekzemple, Sanhua-vino de Gujlin, Osmantflorekstrakto, ricevis grandan disvolviĝon. Ili multe plialtiĝis tiel en kvalito kiel en kvanto post reformado de teknologio kaj estas bone akceptataj de la merkatoj en kaj ekster la lando.


Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, post diligenta konstruado de laborantaj popolanoj en pli ol 20 jaroj, Gujlin, fame konata pro sia bela pejzaĝo, jam fariĝis industria urbo. La loĝantaro plimultiĝis de 130,000 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 320,000. Oni nove konstruis pli ol 300,000 kvadratajn metrojn da loĝejoj, nove kaj ree konstruis pli ol 100 ŝoseojn kaj plivastigis la urban areon de 22 kvadrataj kilometroj ĝis nunaj 54 kvadrataj kilometroj.

Gujlin antaŭenmarŝas kaj prosperas kun ĉiu tago!

# Gujlin


Ĉe la piedo de diversformaj montoj







La industria distrikto de Gujlin en nokto

Bessemer-konvertora laborejo
de Gujlin-a Ŝtala Fabriko








Transistora varmpremo al silicia plumbodrato en Gujlin-a Radio-aparata Fabriko





Ligiang-rivero




Ludi-kaverno

Diecaj-monto (dekstre)







Ĉe la piedo de Bilian-montpinto en Jangŝuo

# Trovo de postrestaj pecoj de "Militarto de Sun Bin"

ĈINAJ arkeologiaj laborantoj trovis lastatempe el tomboj de la komenca periodo de Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. - 24 p.K.) en Linji-gubernio, Ŝandong, pli ol 4,000 bambuajn slipojn, sur kiuj troviĝas postrestaj fragmentoj el la famaj verkoj: *Militarto de Sun-zi* kaj *Militarto de Sun Bin*. La lasta, perdiĝinta jam pli ol mil jarojn, estas aparte valora. La eltrovo de la antikvaj verkoj antaŭ-Kin-dinastiaj estas alia frukto de niaj arkeologiaj laborantoj akirita sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Ambaŭ Sun Vu kaj Sun Bin estis famaj militaj strategiistoj en la antikva Ĉinio. La ĝis nun ekzistanta *Militarto de Sun-zi* estas verkita de Sun Vu. En sia *Historia Libro* Sima Kian, historiisto de Han-dinastio, diris, ke Sun Bin estis unu el idoj de Sun Vu kaj ambaŭ ili verkis pri militarto. Ĉar Sun Vu estis generalo de Vu-regno en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770 a.K. - 476 a.K.), dum Sun Bin estis stabestro de Ki-regno en la meza periodo de Militantaj Regnoj (476 a.K. - 221 a.K.), Ban Gu, alia historiisto de Han-dinastio, nomis en sia *Historia Libro pri Han-dinastio* militartan verkon de Sun Vu *Sun-zi de Vu* kaj tiun de Sun Bin *Sun-zi de Ki*. La unua restas ĝis nun, dum la alia perdiĝis.

Sun Bin vivis kaj aktivis dum la jaroj ĉirkaŭ 380-320 a.K. Li lernis militarton kune kun Pang Gjuan kaj poste kune servis al reĝo Huj de Vej-regno. Pang Gjuan, kiu sciis ke lia kapablo ne povas kompari kun Sun, sub pretekto donis *bin*-punon (forigo de pateloj) al Sun, kiu pro tio estis nomata Bin Poste, venis al Vej sendito de Ki-regno, kiun Sun Bin kaŝe vizitis. La sendito konis lian kapablecon kaj sekrete kunportis lin al sia regno. La generalo de Ki-regno Ĉen Gi, kiu estis amiko de Sun Bin kaj bone konis lian lertecon en militarto, rekomendis lin al reĝo Vej de Ki, kiu postenigis Sun Bin kiel stabestron de generalo Ĉen Gi. Sub ilia komando Ki-armeo gajnis multajn batalojn inkluzive la faman batalon de Gujling en 353 a.K. konatan kiel "sieĝo de Vej por savi Ĝaŭ" kaj la faman batalon de Maling en 341 a.K., en kiu Pang Gjuan estis kaptita kaj pagis per sia vivo. De tio Sun Bin gajnis renomon kaj lia verko pri militarto vaste konatiĝis.

El la menciita trovaĵo, 223 bambuaj pecoj el la postrestaĵo de militarta verko de Sun Bin estas ordigitaj kaj enhavas kune pli ol 6,000 ĉinajn ideografiaĵojn. La ordigita teksto montras la vidpunkton de la verkinto pri milito kaj faktoroj decidantaj la rezulton de milito, kaj pritraktas la problemojn de direktado de milito sub malsamaj kondiĉoj en nombro kaj forteco de disponataj trupoj kaj en malsamaj terenformoj, de batalformacioj, kaj de la kondiĉoj kaj roloj, kiujn komandantoj devas havi kaj ludi ktp. La verko estas skribita iuparte en dialogo, ekz., inter la verkinto kaj reĝo Vej kaj Ĉen Gi, aliparte en traktado aŭ rakontado, ekz., pri la batalo por savi Handan (la ĉefurbon de Ĝaŭ) kaj la batalo de Maling.


La periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj estis tempoj de granda ŝanĝiĝo en la ĉina historio, dum tiuj periodoj la feŭda sistemo anstataŭis la sklavan. Sur la politika kaj ideologia frontoj, okazis tre akra batalo pri restaŭro kaj kontraŭrestaŭro inter la konfucianoj, reprezentantoj de la interesoj de dekadenca sklavoposedanta aristokratio kaj la legalizistoj, reprezentantoj de tiuj de la nove leviĝanta bienula klaso. La neevitebla tendenco de socia disvolviĝo dum tiuj periodoj postulis unuiĝon de la landoj. Tion plenumi per militaj rimedoj estis tasko tiam ŝarĝita de la historio al la politikistoj kaj militaj strategiistoj de la leviĝanta bienula klaso. En la *Militarto de Sun Bin* estas pledataj la tezoj "milite venki kaj potenciĝi" kaj "enordigi per militaj fortoj". Tio signifas batali kontraŭ la restaŭraj fortoj de la dekadenca sklavoposedanta klaso kaj la heredaj, apartigaj, suverenstrebaj fortoj. Estas videble ke la penso de Sun Bin pri militarto kaj liaj strategio kaj taktiko heredis la tradiciojn de la milita penso de la bienula klaso nove leviĝinta en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno, kies reprezentanto estis Sun Vu. Kaj Sun Bin disvolvis kaj kompletigis ĝin en iuj flankoj.

En la trovitaj bambuaj skribaĵoj troviĝas riĉa enhavo pri direktado de milito kaj estas multe pritraktata atako per malmulta forto kontraŭ malamiko supera en nombro. En siaj respondoj al la reĝo Vej de Ki kaj generalo Ĉen Gi, Sun Bin proponis multajn metodojn por batali kontraŭ malamiko supera en forto aŭ nombro, ĉefe ĉirilate: "Klopodi por disapartigo de malamikaj trupoj". Siaflanke dum milito, li pledis por ataki malmulton per multo. Tiu aktiva maniero de direktado de milito ne nur diferencas de la tezo, ke "oni ne eblas batali kontraŭ malamiko granda, multnombra kaj forta, sin apogante sur malgrandeco, malmulteco, malforteco", sed ankaŭ disvolvis la antaŭirintan teorion pri atako kontraŭ multo per malmulto. En sia milita praktikado, Sun Bin plene disvolvis tiun penson.

Pri atako kontraŭ ĉirkaŭmurigita urbo kaj pri aranĝo de batalformacioj en la trovitaj bambuaj slipoj estas relative konkretaj eksplikoj. Ĝi dividas la urbojn kun malsamaj topografiaj kondiĉoj en facile atakeblajn kaj malfacile atakeblajn. Tio estas malofte trovebla en antaŭaj militaj libroj, ke atako kontraŭ ĉirkaŭmurigitaj urboj estas tiel multe pritraktata. Pri batalformacioj, la verko precipe eksplikas la karakteron, aplikadon kaj praktikadon de diversaj batalformacioj. En la verko estas eksplikitaj dek diversaj batalformacioj, kiuj formas kvin parojn, laŭ vidpunkto de ofensivo kaj defensivo.

Ĝi prezentas rigorajn postulojn al "komandanto" de trupoj. En la ĉapitro "Kulpo de Komandanto" estas menciitaj 32 kazoj de malvenkoj de trupoj kaŭzitaj de malbona komando fare de generaloj, ekz., "ordonoj ne efektivigitaj, militistoj neunuanimaj estas kazoj por malvenki", "subuloj neobeemaj, militistoj nesindonaj estas kazoj por malvenki", "trupoj, de kiuj la popolo sentas turmenton, estas venkeblaj". En la ĉapitro "Malvenko de Komandanto" estas menciitaj 20 propraj mankoj de komandanto, kiuj kaŭzos malvenkon, ekz., "esti nekapabla, sed mem pretendi esti tia", "esti fiera", "esti avida pri rango", "esti avida pri riĉeco", "manko de kuraĝo" "manko de kredindeco" ktp.

Kiel fama milita strategiisto kaj verkisto pri militarto, Sun Bin estis rekonita ĝis Han-dinastio. Sed, ĉar Caŭ Caŭ nenion menciis pri *Sun-zi de Ki*, en komentariado de Caŭ Caŭ pri *Militarto de Sun-zi*, nek en la pliposta *Historia Libro pri Suj-dinastio*. Tio montras ke tiu verko probable jam perdiĝis en Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Tial, de Song-dinastio (960-1279 p.K.), iuj opiniis ke *Militarto de Sun-zi* ne estas verko de Sun Vu; aliaj eĉ dubis pri la ekzisto de homo nomata Sun Vu, plimultaj konjektis ke la ĝis nun ekzistanta verko *Militarto de Sun-zi* estas eble komencita unue de Sun Vu kaj kompletigita poste de Sun Bin, kiel verko resumanta la sperton pri milito dum la longa tempo de la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno ĝis la meza periodo de Militantaj Regnoj, devenanta ne de unu sola mano, ktp. Nun, la samtempa eltrovo de *Militarto de Sun Bin* kaj *Militarto de Sun-zi* fine solvis la problemon longtempe diskutitan.



*Parto de bambuaj slipoj de* Militarto de Sun Bin

Krom la du militartaj verkoj inter la bambuaj slipoj ĉifoje elterigitaj estas 4942 slipoj konstituantaj aliajn verkojn antaŭ-Kin-dinastiajn, sed neniun libron konfucianisman. La tomboj estis konstruitaj nelonge post la bruligo de libroj fare de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio. Tio pruvas ke li bruligis kaj malpermesis, sub rigora politika normo, nur la librojn konfucianismajn, donante pezan baton al la reakciaj restaŭraj fortoj, kiuj jesas la antikvajn kaj neas la nuntempajn. La nova eltrovo estas ankaŭ forta refuto kaj plena malkovro al la renegato kaj naciperfidulo Lin Biaŭ, kiu atakis la Unuan Imperiestron de Kin-dinastio pro lia "bruligo de libroj kaj enterigo de vivantaj konfucianoj".

La nova eltrovo de la bambuaj slipoj, precipe la longtempe perdiĝinta verko *Militarto de Sun Bin*, liveris novan gravan materialon por studo pri la historio de la batalo inter la konfucianoj kaj legalizistoj antaŭ Kin-dinastio kaj pri la militarta penso en antikva Ĉinio. Samtempe ĝi havas ankaŭ valoron por studi la evoluon de ĉina ideografio de *li ŝu* (formo de skribado de ĉina ideografio uzita dum certa historia periodo) kaj por studi la arton de belskribado.

Inter Amikoj

# Rumana kantdanca ensemblo Maramureŝ en Ĉinio

*Sin vestas verde la arom-arbar' en bonodoro,*
*Patrio mia kara ja similas al ĝardeno.*
*Ho, pasis mi tra ĉiuj belaj montoj kaj ebenoj,*
*Deŝiris kaj bukedon post buked' da freŝaj floroj,*
*Por doni ilin al vi ĉinaj fratoj la honoraj.*

Okaze de ĝoja celebrado de la 30-a datreveno de liberigo de Rumanio, la Rumana Kantdanca Ensemblo Maramureŝ venis al Ĉinio por fari vizitadon kaj prezentadon. La supremenciita ĉarma kanto *Al la Amiko Ĉina Popolo* esprimis ĝian profundan amikecon al la ĉina popolo. La kamaradoj de la ensemblo faris novan kontribuon por pliigi la amikecon inter la popoloj de ambaŭ landoj.

## BRILA PREZENTADO

La rumana popolo estas laborema, brava kaj lerta en kanto kaj danco. En longtempa historia evoluado ĝi kreis riĉan popolan arton kun apartaj naciaj karakterizaĵoj kaj lokaj koloroj. Post la liberiĝo tiu tradicia arto ricevis novan disvolviĝon sub la kondiĉo de socialismo kaj fondiĝis multaj profesiaj trupoj de popolaj kantoj kaj dancoj. Maramureŝ estas unu el ili. Ili ofte faras prezentadon en fabrikoj, vilaĝoj kaj lernejoj, kaj rikoltis varman bonvenigon de la amasoj.

La programeroj prezentitaj de la ensemblo en Ĉinio manifestis la amon de la rumana popolo al la patrolando kaj laboro, prikantis ĝian saĝon kaj forton montritajn en la socialisma konstruado kaj spegulis ĝian ĝojon post laboro. La novtipa *Ministа Danco* estas ekstraktita el la labora vivo de ministoj. Ĝi kun klara temo kaj nova esprimmaniero prikantas la ministojn, montras ilian ardan entuziasmon en la socialisma laborkonkurso kaj viglan scenon de ilia kuna antaŭenmarŝo. La solo *La Patro Sendas Min en Fabrikon* esprimas ĝojon




*Ili kantas* Al la Amiko Ĉina Popolo.

kaj emociiĝon de junulo unuafoje enirinta en fabrikon per malrapidaj ritmoj kaj agrabla melodio. La muzikpeco *Koncerto de Sirba* prikantas hortikulturistojn, kiuj akiris riĉan rikolton de fruktoj post ŝvitoplena penlaboro. Tiuj kantoj kaj dancoj vidigis al ni la prosperan socialisman Rumanion kaj pliigis nian komprenon pri kaj respekton al la rumana laboranta popolo.

La rumana popolo havas gloran revolucian tradicion. Ili ne timas fortajn subpremojn, kuraĝas rezisti kontraŭ agreso de fremdaj landoj kaj ĉiam protektas sendependecon kaj dignecon de sia nacio. En la kanto *Gheorghe Aliĝas al la Armeo* ni sentis la patriotismon de la rumana popolo. Hodiaŭ la revolucia spirito havas ankoraŭ plian disvolviĝon en la justa batalo de la rumana popolo kontraŭ imperiismo, koloniismo, hegemoniismo kaj potenca politiko.

## KANTADO POR AMIKECO

Ĉinio kaj Rumanio ambaŭ estas evoluantaj socialismaj landoj kaj iliaj popoloj formis profundan revolucian amikecon en la komuna batalo. Ĝuste pro tio la artistoj de Maramureŝ forte amas kanti la ĉinajn revoluciajn kantojn plenajn de batala spirito. Antaŭ sia veno al Ĉinio ili diligente lernis kanti ĉinajn kantojn kaj post la atingo al Pekino ili sin ekzercis tuj en la nokto. Ili diris: "Ni kantas por la amikeco kaj dediĉos nian tutan fervoron al la ĉina popolo." Kiam ili kun plena emocio kantis la ĉinajn kantojn *Mi Amas la Grandan Patrolandon*, *La Granda Pekino* kaj *Flirtas Ruĝaj Flagoj en Printempaj Sunbriloj*, ni ĉiuj estis forte kortuŝitaj kaj pli alte taksis la amikecon inter la ĉina kaj rumana popoloj.

La amikeco inter la du popoloj povas elteni ĉian ajn provon. Ĝuste kiel respondeculo de la ensemblo diris en la amuzkunveno okazigita de la Danco-lernejo de la Centra Arta Universitato "La 7-a de Majo": "La amikeco inter ni havas profundajn kaj firmajn radikojn sur la revolucia bazo." La ĉefurbaj literaturaj kaj artaj laborantoj organizis kantodancan amuzvesperon por bonvenigi la gastojn. Kiam ĉina kantisto kantis la kanton *Jen Estas Mia Moldavio*, ŝatatan de la rumanaj popolanoj kaj spegulantan la feliĉan vivon ĉe la orienta landlimo de Rumanio, la halo tuj tondris per varma manklakado.

## EN LA KOMUNUMO

En la tagoj kiam la ensemblo restadis en Pekino, la membroj de la Ĉina-Rumana Amikeca Popola

*Rumanaj artistoj en dancado*



Komunumo sentis apartan ĝojon pro jenaj tri aferoj: La 23-a de aŭgusto estas la 30-a datreveno de liberigo de Rumanio; aŭgusto de la kuranta jaro estas la 10-a datreveno de la nomiĝo de la komunumo; ĝuste en tiuj ĝojaj tagoj la ensemblo baldaŭ venos al la komunumo por kune celebri la festojn.

En ĝoja tamtamado kaj tamburado la rumanaj kamaradoj venis al la komunumo. Kiom da koraj vortoj la batalamikoj de ambaŭ landoj deziris verŝi unu al alia promenante ĉe kamprandoj! Antaŭ dek jaroj la pomua produktokvanto de legomoj en la komunumo estis nur 3,500 kilogramoj kaj nun ĝi kreskis ĝis 5,000 kilogramoj; tiu de greno estis nur 300 kilogramoj kaj hodiaŭ ĝi jam atingis 450 kilogramojn. Nun la tuta komunumo jam efektivigis maŝinirigacion per elektro. Ĉiuj komunumanoj ankoraŭ klare memoris, ke, kiam la Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo ricevis sian nomon antaŭ dek jaroj, la partia kaj registara delegacio de Rumanio alportis al ĝi ŝarĝaŭtojn kaj bonajn speciojn de maizo, legomoj kaj aliaj. La rumanaj kamaradoj rigardis la komunumon kiel sian hejmon kaj ĝiajn produktajn atingojn kiel siajn. La estro de la revolucia komitato de la komunumo prave diris: "Niaj venkoj enhavas ankaŭ kontribuon de rumanaj kamaradoj!" La dek jaroj forpasis, tamen la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio jam donis abundajn fruktojn.

Por bonvenigi la rumanajn amikojn la kamaradoj de la prezenta taĉmento de la komunumo urĝe sin okupis per programeroj. Dum pluraj tagoj ili ne ripozis por provludi memverkitan dancon *Ĝoja Celebrado al la 30-a Datreveno de Liberigo de Rumanio* kaj la kantojn *Kanto pri Amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio*, *En Aminda Bukareŝto* kaj aliajn. Ili diris kun ĝojo: "Ni rigardas la festan tagon de la rumana popolo kiel nian propran kaj ege ĝojas pro la renkontiĝo kun la rumanaj kamaradoj." En ĉambro kamaradinoj de la ensemblo kaj la knabinoj de la prezenta taĉmento kore interparolis kaj sur la komunuma placo la rumanaj artistoj plenvoĉe kantis la ĉinan kanton *Mi Amas la Grandan Patrolandon.* Ĉie aŭdiĝis ridoj kaj kantoj. Oni ja dronis en la maro de amikeco . . .

Krom Pekino la rumanaj artistoj vizitis ankaŭ Ŝanhajon, Nankinon kaj aliajn lokojn. Ni kredas, ke la amikeco de la popoloj de niaj ambaŭ landoj certe senĉese firmiĝos kaj fortiĝos en la batalo kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj en la sendependa kaj memdecida konstruado de socialismo. La floroj de amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio certe disfloru pli kaj pli bele!


## Kurantaj Aferoj

### SCIENCA ESPLORADO SUR KINGHAJ-TIBETA ALTEBENAĴO

Scienca esplora taĉmento konsistanta el sciencaj laborantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, de diversaj lokaj ĉi-rilataj institutoj, altlernejoj, produktaj entreprenoj kaj de tiuj en Tibeto faris ekde la jaro 1973 sintezan esploradon multfakan sur Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo kaj jam akiris unuan frukton post unu jaro.

La taĉmento, kiu ampleksas pli ol dudek fakojn, faris pli-ol-kvin-monatan esploradon en Caju kaj Bome en oriento de Tibeto, kaj iuj el tiuj fakoj eĉ en Meto, Baŝju k.a. lokoj, sub la apogo kaj helpo de la lokaj partiaj kaj registaraj organizoj, trupoj kaj diversnaciecaj popolanoj. Venkinte la malfavoran naturkondiĉon de oksigenmanko sur altebenaĵo kaj aliajn malfacilojn, ili plenumis unuapaŝan esploran taskon kaj akiris ĝojindajn fruktojn. Iuj taĉmentanoj faris daŭre pluan esploradon dum pli ol du monatoj en glaciriveraj regionoj kun absoluta alteco de pli ol 4,000 metroj. Tio estis la unua relative sistema esplorado pri oceana glacirivero de Ĉinio, kaj akumulis materialojn por la scienco pri glaciriveroj en nia lando. La taĉmento kolektis en profundaj ravinoj valorajn materialojn por esplori la kaŭzon de formiĝo de altebenaĵo kaj leĝon de mineralformiĝado kaj de variiĝoj de naturaj geografiaj cirkonstancoj kaj por difini la direkton de agrikultura disvolviĝo ktp. Oni trovis pli ol 40 novajn botanikajn speciojn kaj unu novan ordon de insektoj antaŭe ne trovitan en nia lando, per kio ili faris kontribuon por studi la insektojn en nia lando. Iuj taĉmentanoj piedire esploris en profundaj valoj de Jalucangpo-rivero du monatojn kaj akiris relative riĉajn primarajn materialojn pri geologio, geomorfologio kaj akvaj riĉfontoj.

Krom tio, ili faris ankaŭ specialan esploradon pri tieaj problemoj de agrikulturo, forstumo, akvoreguligo k.a. kaj prezentis konkretajn opiniojn por fari ekspluatadon kaj utiligadon.




# BIRDOJ KAJ BESTOJ EN ĈINIO

LA vasta teritorio de Ĉinio etendiĝas sur glacia, mezvarma kaj tropika zonoj. Pro varieco de ĝiaj terformoj kaj vegetaĵoj vivas sur ĝi relative multaj specioj de birdoj kaj bestoj. Ĝis nun estas registritaj pli ol 1,100 specioj de birdoj kaj pli ol 400 specioj de bestoj.

La birdaro kaj bestaro en la nordo rimarkinde malsamas al tiuj en la sudo de la lando.

## EN LA VASTA NORDO

La vasta nordo de Ĉinio ampleksas jenajn kvar regionojn:

**Nordorienta regiono,** inkluzive de la Granda kaj Malgranda Hing-an-montaroj kaj Ĉangbaj-montaro, havas frostan klimaton. En tiu ĉi regiono, aparte multas frostoeltenemaj arbaraj bestoj, inter kiuj la plej popularaj ronĝuloj estas sciuro, striita sciuro (*Eutamias sibiricus*). Sciuro estas unu el peltodonaj bestoj. Grandaj herbomanĝantaj bestoj estas alko, makulita kaj ruĝa cervoj (*Cervus nippon* kaj *Cervus elaphus*), kapreolo k. a. Tie estas ankaŭ multaj karnomanĝuloj, ekz., nordorienta tigro, leopardo, vulpo k.a., el kiuj la plej fama estas zibelo.

La bonazio, ring-kola fazano kaj monta koturno estas la plej oftaj kaj ekonomie valoraj ĉasaĵbirdoj en la regiono.

**Nordĉina regiono** inkluzivas la basenojn de la Flava Rivero kaj Huajhe-rivero kaj la Leŭsan Altebenaĵon en okcidento. La loko karakteriziĝas per vasta ekzisto de ronĝuloj malutilaj al agrikulturo, ekz., mikroto, zokoro (*Myospalax*), *Lepus capensis* (specio de leporo) k.a.


Tre raras grandaj kaj mezgrandaj arbaraj bestoj pro ekspluato de arbaroj, escepte de malmultaj kapreoloj, aproj k.a. El la ofte vidataj karnomanĝantaj bestoj estas ĉefe de mezgrandaj kaj malgrandaj specioj, ekz., melo, mustelo k.a. La birdoj kiuj havas valoron ekonomie, estas ekz., brunorela fazano, long-vosta fazano, roka fazano (*Alectoris graeca pubescens*) k.a.

**Regiono de Interna Mongolio kaj Hingiang** inkluzivas okcidentan parton de Nordoriento, Internan Mongolion, nordan Ninghia, Nordokciden-

*Nordorientaj tigroj de Ĉinio*



*Leopardo*



tan Gansu kaj Hingiang. Tie estas multaj ronĝuloj kaj hufuloj. El la ronĝuloj la plej tipaj estas sablorato (*Meriones*) kaj dipodo. Krome, vaste troviĝas en la regiono ankaŭ stepa marmoto (*Marmota bobac*), tersciuro (*Citellus*), stepa musleporo (*Ochotona pusilla*) kaj mongola leporo (*Lepus capensis*). Ili multe generas en la favoraj kondiĉoj kaj difektas paŝtejon se oni ne ĝustatempe ekstermas ilin. El hufuloj plej oftaj estas mongola gazelo (*Procapra gutturosa*) kaj gazelo (*Gazella*). La unua vagas pogrupe sur stepo oriente, dum la lasta vivas en dezerto okcidente. En la nordokcidenta limregiono de Hingiang, estas altnaza antilopo (*Saigatatarica*), kies korno estas valora en ĉina tradicia medicino. La sovaĝa ĉevalo (*Equusprzewalskii*), sovaĝa kamelo kaj hemiono estas apartaĵoj de la regiono, kaj plej oftaj el karnomanĝuloj estas lupo kaj korsako k.a.

El birdoj la famaj specioj estas granda otido, sirapto, sabla alaŭdo kaj tera ruĝkrura korniko, kiuj tre bone adaptiĝas al la vivo sur stepo kaj dezerto. Krome la ruĝverta gruo (*Grus japonensis*) kaj bluorela fazano estas ankaŭ famaj el tieaj birdoj.

**Kinghaj-tibeta regiono** havas malpli multajn animalajn speciojn ol aliaj lokoj pro frosteco kaj sekeco kaj malmultaj nutraĵoj. La tieaj animaloj konsistas ĉefe el specioj adaptiĝintaj al altmonta herbejo kaj altebenaĵa frostodezerto, ekz., gruntbovo kaj tibeta antilopo (*Pantholops hodgsoni*) el hufuloj, longlana leporo, tibetaj musoleporo (*Ochotona thibetana*) kaj tibeta marmoto el ronĝuloj, kaj neĝa leopardo (*Panthera uncia*) kaj tibeta sabla vulpo (*Vulps corsde*) el karnomanĝuloj. La tibeta marmoto liveras plej multe felon en la loko. La dresita gruntbovo estas bruto nemankipova en Tibeto, kiu ludas grandan rolon en transportado sur la altebenaĵo.

El birdoj la plej oftaj specioj estas himalaja vulturo (*Gyps fulvus himalayensis*), tibeta neĝa koko (*Tetraogallus himalayensis*), tibeta sirapto kaj neĝa fringo.

## EN LA VASTA SUDO

La vasta sudo de Ĉinio dividiĝas en jenajn tri regionojn:


**Sudokcidenta regiono** inkluzivas okcidentan Siĉuan, Hengduan-montaron norde de Junnan kaj la plej sudan parton de orienta Tibeto. En la lokoj relative plialtaj troviĝas, ekz., musoleporo, marmoto, moskulo kaj makulvosta bonazio, kaj en la lokoj malpli altaj estas ekz., makako kaj civeto.


*Malgranda pando*

*Zibelo*

*Tibeta gruntbovo*







En la regiono produktiĝas kelkaj raraj bestoj, el kiuj la plej famaj estas granda pando, malgranda pando, orhara simio kaj bubala antilopo (*Budorcas taxicolor*). La granda pando fame konata tra la mondo vivas en bambuaro sur monto je 2,600-3,500 metroj alta super la marnivelo.

El la birdoj turdo kaj certaj fazanoj estas superaj en nombro. Preskaŭ duono el la pli ol 20 specioj de fazanoj de Ĉinio vivas en tiu ĉi regiono, ekz., tibeta blanka orela fazano (*Crossoptilon crossoptilon*) kaj ora fazano (*Chrysolophus pistus*). Ankaŭ

tiel estas pri turdoj. Tial, la loko estas nomata edeno de fazanoj kaj turdoj.

**Centra Ĉinio** inkluzivas la mezan kaj malsupran basenon de Jangzi-rivero. En la loko plejparte estas sudaj specioj, ekz., stumpvosta simio, civeto, pangolino (*Manis pentadactyla*) kaj ardeo, florbekanto (*Dicaeum ignipectus ignipectus*) k.a. kaj ankaŭ malmultaj nordaj specioj, ekz., griza pigo k.a.

La specioj specialaj por la regiono estas nur granda pipistrelo, senkorna cervo (*Hydropoteo inermis*), ĉina riverdelfeno kaj bambua fazano (*Bambusicola thoracio thoracio*) kaj ora fazano el birdoj. La akvaj birdoj, kiuj pasigis vintron tie, estas granda riĉfonto en la lagoj de tiu regiono.

**Sudĉina regiono** ampleksas la plej sudajn partojn de Fugian, Guangdong, Guanghi kaj Junnan, kaj Tajvan inkluzive la insularojn en la Suda Ĉina Maro. La regiono havas plej multajn animalajn speciojn en la tuta lando, pro siaj favoraj naturaj kondiĉoj, troviĝante en tropika zono. El bestoj la relative apartaj estas ĉefe la specioj loĝantaj en tropika arbaro, ekz., arbosoriko (*Tupaiaplis*), loriso, kaj gibono. La plej famaj inter karnomanĝuloj estas sudĉina tigro, civeto kaj nebula leopardo. Kaj en la plej suda parto de Junnan oni trovas ankaŭ sovaĝan elefanton.

El birdoj estas ĉefe papago, bucero, larĝbeka birdo (*Psarisomus dalhousiae*) kaj sunbirdo. En la suda parto de Junnan troviĝas famaj verda pavo kaj sovaĝa koko, kiu estas praavo de la koko en Ĉinio.

Tajvan kaj Hajnan-insulo havas multajn apartajn speciojn, ekz., tajvan-a nigra urso, tajvan-a simio, tajvan-a longvosta fazano kaj hajnan-a leporo kaj hajnan-a pava fazano. Sur multaj insuloj en la Suda Ĉina Maro amasiĝas grandaree sul-fekaĵo, kiu estas grandkvante uzata por sterki kampojn.

## UTILIGO KAJ PROTEKTO DE RIĈFONTOJ DE SOVAĜAJ ANIMALOJ

La fonto de sovaĝaj animaloj estas unu el la riĉaĵoj de Ĉinio, kaj ties protekto kaj racia utiligo povas akceli la disvolviĝon de socialisma ekonomio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉasa, breda kaj naturprotekta aferoj trovas rapidan disvolviĝon kaj nemalmultajn atingojn.

**Ĉasado:** La areo de montregiono de Ĉinio okupas 60-70% de la tuta teritorio, kio provizas bonajn kondiĉojn por ĉasado. Nun ĉiujare la ŝtato aĉetas grandajn nombrojn da feloj de sovaĝaj bestoj kaj da junaj cervokornoj, mosko kaj aliaj animalaj produktaĵoj uzataj en medicino. Kaj la granda kvanto da karno de sovaĝaj bestoj estas ankaŭ konsiderinda. En iuj lokoj ĝi egalas kvante preskaŭ al triono de la viando ricevita el buĉbrutoj.

La ĉasaj bestoj varias en diversaj lokoj, kaj ĉefe estas sciuro, flava mustilo (*Mustela sibirica*), sovaĝa leporo, marmoto, moskulo, kapreolo, apro, mongola gazelo, simio kaj sovaĝa ansero, sovaĝa anaso, fazano k.a.

**Bredado:** Bredado de sovaĝaj animaloj estas preskaŭ tute nove entreprenata post la Liberiĝo.

La bredataj specioj enlandaj estas zibelo, lutro k.a., kaj la specioj enkondukitaj de eksterlande estas ĉefe lutreolo kaj kastoro. Pri moskaratoj la plejparto da provincoj kaj aŭtonomaj regionoj jam starigis disvastigajn staciojn kaj nemalmultaj lokoj jam ilin produktas.


Pri cervobredado, kreskas en la lastaj jaroj ne nur la kvanto bredata, sed ankaŭ la nombro de specioj: estas bredataj ankaŭ ruĝa cervo kaj moskulo krom makulita cervo (*Cervus nippon*). En iuj lokoj la bredado de moskuloj kaj ruĝaj cervoj jam atingis la etapon de libera sinpaŝtado.

**Naturprotektado:** Nun, stariĝis en Ĉinio nemalmultaj rezervaj regionoj malpermesitaj al ĉasado kaj naturprotektaj regionoj, kiuj estas destinitaj ne nur por protekti naturajn riĉfontojn, sed ankaŭ servi kiel bazoj por reguligi la kvanton de sovaĝaj animaloj, protekti kaj bredi utilajn birdojn kaj bestojn, enkonduki, bredi kaj rebredi novajn speciojn. Tiamaniere, oni povas protekti animalan riĉfonton kaj plie aktive disvolvi animalajn riĉfontojn, utiligante la naturajn kondiĉojn, kaj ilin racie ekspluati.


*Grandaj pandoj*




*Orharaj simioj*



*Makulitaj cervoj*



Aktoroj de la Hingiang-a Kantodanca Ensemblo prezentas kantodancon *Bona Estas Popolkomunumo* por paŝtistoj de diversaj nacioj sur paŝtejo ĉe Ili-rivervalo.



# Ĉinaj artistoj lernas de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj servas al ili





Filma aktoro Ju Jang kore interparolas kun maljuna labormodelo Gia Gincaj (maldekstre) dum sia partopreno en kolektiva laboro en Daĝaj-brigado.



Post sia prezentado por laboristoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio, geaktoroj de la teatra grupo de *Rododendra Monto* de la Pekinopera Ensemblo de Pekino petas de laboristinoj opiniojn.



Laborantoj de Hajnan-distrikta Kantodanca Ensemblo de Guangdong-provinco laboras kune kun fiŝistoj.

Kuang Gianlian (Hong Hiannju), aktorino de la juegjuopero de Guangdong-provinco, kantas elektitan pecon de *Haveno* por komunumanoj en laboropaŭzo.









Prezentado de Ulanmuĉi-a Propaganda Taĉmento por paŝistoj



Artistino de la Ĉina Popola Liberiga Armeo prezentas por komandantoj kaj batalantoj en landlima gardejo.

# Respondoj pri abonado de nia gazeto

**Demando:** Kiu nun estas distribuanto de la gazeto EPĈ?

**Respondo:** Nia ĝenerala distribuanto nun fariĝas Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), kiu pro tio starigis jam speciale Esperantan Sekcion kaj uzas daŭre la adreson: P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Ĉar ĝi havas agentojn en diversaj landoj, sekve ankaŭ tiuj agentoj (librejoj) akceptas abonojn de nia gazeto. Se en iu urbo estas librejo, kiu vendas eldonaĵojn el Ĉinio, ĝi estas tre probable agento de Guozi Shudian, kiu lasta estas la sola eksportanto de ĉinaj eldonaĵoj. Pri tio oni tamen devas unue certiĝi ĉe la koncerna librejo. Se ĝi konfirmas tion, oni povas aboni nian gazeton ĉe ĝi,kaj tiu prizorgos la aferon por la paginto. Ĉu estas agento en iu urbo kaj kiu ĝi estas, pri tio oni kompreneble povas informiĝi letere ĉe Guozi Shudian.

Malnovaj perantoj de nia gazeto (esperantistoj) estis petataj daŭre funkcii, kaj oni povas aboni nian gazeton ankaŭ pere de tiuj perantoj.

Se iu abonas kaj pagas ĉe agento aŭ peranto, oni bonvolu doni la abonilon aŭ adreson ankaŭ al li kune kun la pago. Ne sendu ĝin aparte al Guozi Shudian! La abonitajn numerojn oni ricevos rekte de Guozi Shudian, al kiu la agento aŭ peranto ĉiam informas pri ricevitaj abonoj.

Nature oni ankaŭ povas aboni nian gazeton rekte ĉe Guozi Shudian mem laŭ la adreso menciita supre.

**D.:** Kiom kostas abono de EPĈ kaj kiel pagi la abonon?

**R.:** La abonkosto varias laŭ abondaŭro kaj lando. 2-jara kaj 3-jara abonoj estas kompare pli malkaraj ol la unujara. Abontarifon petu ĉe Guozi Shudian. Oni povas informiĝi ankaŭ ĉe agentoj kaj perantoj pri abonkosto por la koncerna lando.

La abonkoston oni pagu per mono al agentoj aŭ perantoj. Al Guozi Shudian oni povas pagi per ĉeko aŭ kambio aŭ sendi la sumon al:

A/C Guozi Shudian, Bank of China (banko de Ĉinio) 111 Cannon Street, London EC4N 5AS, Anglio kun la indiko: Por Esperanta Sekcio

**D.:** Ĉu vi povas informi min, je kiu numero finiĝos mia abono?

**R.:** La periodo de abono de ĉiu abonanto estas indikita supre sur la adresoslipo, kiun ĉiu abonanto de nia gazeto povas facile trovi sur la koverto de ĉiu ricevita numero. Ekzemple, "1/74 — 12/76" signifas: la abono komenciĝas de n-ro 1 de 1974 kaj finiĝos je n-ro 12 de 1976. Estas dezirinde ke la abonanto konstante tion legu por ke li povu ĝustatempe renovigi sian abonon kaj daŭre ricevi nian gazeton sen interrompo.

Se la abonanto deziras ŝanĝi sian adreson aŭ havas ian deziron koncerne sian abonon, li estas petata kunsendi tiun adresoslipon al Guozi Shudian (nur al ĝi). Tio faciligos la administracian laboron kaj akuratan plenumon de la deziroj.

**D.:** De kiu numero mi komencos ricevi, se mi nun faras la abonon? Ĉu mi povos ricevi la kampletan jarkolekton de 1975?

**R.:** Ĝenerale abonoj estas akceptataj tra la tuta jaro kaj komenciĝos de la tuj aperonta numero. Oni kalkulas 12 numerojn por unu jaro, 24 numerojn por du jaroj ktp.

Sed en speciale difinita periodo GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) kutime lanĉas kampanjon por varbi novajn abonantojn por la venonta jaro. Nun la kampanjo por 1975 jam komenciĝis. Se vi tuj abonos nian gazeton, vi povos ricevi la kompletan jarkolekton de 1975 kaj ankaŭ memoraĵon por abonantoj de la jaro (Esperanta kalendaro de 1975).

La distribuanto tre petas ke la abonantoj varbu por nia gazeto novajn abonantojn. Se vi sukcesos, bonvolu skribi al la distribuanto, kiu estas preta por sendi al vi ian memoraĵon kiel dankesprimon.

La Red.

# Gazetoj el Ĉinio

PEKINA REVUO — Semajna gazeto de politiko kaj teorio. Ĝi aperas en la angla, franca, germana, hispana kaj japana lingvoj kaj estas distribuata aerpoŝte tra la mondo.

ĈINIO — Grandformata monata gazeto kun belaj bildoj kaj lakonaj tekstoj. Ĝi aperas en la ĉina, angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, sŭahilia, urdua kaj vjetnama lingvoj.

ĈINIO EN KONSTRUADO — Monata gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo. Ĝi aperas en la angla, franca, hispana, araba kaj rusa lingvoj.

ĈINA LITERATURO — Literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj trimestre en la franca.


POPOLA ĈINIO — Monata gazeto kun ĝenerala enhavo eldonata en la japana lingvo.

ĈINA MEDICINA GAZETO — Medicina gazeto kun ĝenerala enhavo en la angla lingvo eldonata de la Ĉina Medicina Asocio. Ĝi raportas la principon kaj politikon pri la higienaj laboroj de Ĉinio kaj informas pri disvolviĝo kaj atingoj en studo de la ĉina medicino.

ĈINA EKSTERA KOMERCO — Trimestra gazeto raportanta pri atingoj de la socialisma ekonomia konstruado de Ĉinio kaj pri la principoj kaj politiko de la ĉina ekstera komerco kaj prezentanta eksportatajn varojn de Ĉinio. Ĝi aperas en la ĉina kaj angla lingvoj.

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio.

Abonu ĉe lokaj agentejoj aŭ rekte ĉe Gazeta Fako, Guozi Shudian, P.O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio.




*Esperante Parolas*

## Radio Pekino

### Al Eŭropo

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 4:00 — 4:30 |
| **GMT** | Vendredo k Sabato 20:00 — 20:30 |
| **Ondoj (m)** | 43 33 31 |

### Al Japanio, Koreio

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 19:00 — 19:30 |
| **Ondoj (m)** | 47 40 |

### Al Sudorienta Azio

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 20:30 — 21:00 |
| **Ondoj (m)** | 30 25 |

# EL POPOLA ĈINIO

## Abonoj kaj abonigoj por 1975 varbataj

| Abonprezoj: | | | |
|---|---|---|---|
| | 1-jara | £ 0.90 | US$ 2.20 |
| | 2-jara | £ 1.35 | US$ 3.30 |
| | 3-jara | £ 1.80 | US$ 4.40 |

**Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)**
**P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**Abonu ĉe niaj lokaj agentoj aŭ EPĈ–perantoj aŭ rekte ĉe Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN**

**Specimeno senpaga laŭ peto**




*Malgrandaj bredistoj*
Pentrita de **Ĝang Deking**

# Kurantaj Aferoj

## DALIAN PRODUKTIS 4,000-ĈEVALPOVAJN DIZELAJN LOKOMOTIVOJN

Puŝate de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la Lokomotiva kaj Vagona Fabriko de Dalian, en kunlaboro kun la bezonantaj unuoj de lokomotivoj kaj la koncernaj sciencaj institucioj kaj superaj lernejoj, projektis kaj produktis 4,000-ĉevalpovan solmaŝinan dizel-elektran lokomotivon.

La veturado de pli ol 100,000 kilometroj sub diversaj kondiĉoj montris, ke tia lokomotivo estas bonkvalita kaj fidinda. Tirante pasaĝerajn vagonojn la lokomotivo glate kuras 120 kilometrojn po horo. Kun ŝarĝvagonoj, ĝi montras plirapidan starton kaj kuras pli rapide dum ascendo sur kruta deklivo kaj tra tuneloj kompare kun la plej potenca vaporlokomotivo nun uzata en Ĉinio. Ĝia olekonsumo po ĉevalpovo kaj ĝia pezo po ĉevalpovo reduktiĝis respektive je 10% kaj 40% kompare kun tiuj de la 2,000-ĉevalpova dizela lokomotivo antaŭe produktita. Plie la manipulado estas simpla kaj la riparado kaj fabrikado estas facilaj. Produkto de tiaj lokomotivoj havas gravan signifon por vaste uzi dizelajn lokomotivojn en fervoja trafiko kaj por akceli la disvolvon de agrikulturo kaj industrio.

## LA TIBETA LINGVO VASTE UZATA

Depost la demokratia reformo en 1959, la kultura, eduka kaj eldona aferoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono rapide progresis kaj la tibeta lingvo estas vaste uzata en la diversnivelaj registaroj, lernejoj kaj aliaj kulturaj institucioj.

Antaŭe, sub la regado de la feŭda servuta sistemo, la servutuloj, kiuj okupis 95% de la tuta loĝantaro de Tibeto, estis senigitaj je la rajto de klerigo kaj kultura aktivado. Tiam en Tibeto estis nur kelkaj lernejoj por infanoj de mastrosinjoroj kaj aristokratoj, kelkaj ksilografiaj presejoj por sutroj kaj superstiĉa aktivado. Tial la uzado kaj disvolvo de la tibeta lingvo estis grave limigitaj.

Nun la regiono jam havas pli ol 3,000 elementajn, mezgradajn lernejojn kaj teknikajn liceojn, kiuj senescepte instruas la tibetan lingvon kiel la ĉefan lecionon. La Tibeta Instituto por Nacimalplimultoj havas tibetlingvan fakultaton. Multaj lernantoj devenintaj de servutuloj okupas sin pri studo kaj tradukado de la tibeta lingvo. Ankaŭ en vesperaj lernejoj en la kamparo kaj paŝtejoj la tibeta lingvo estas ĉefa objekto.

La Tibeta Popola Eldonejo fondita en la Granda Proleta Kultura Revolucio eldonis 46 specojn de libroj en la tibeta lingvo kun 1.5 milionoj da ekzempleroj. La eldonaĵoj estis vaste distribuitaj inter la kamparanoj kaj paŝtistoj kaj trovis varman bonvenon. En 1972 oni konstruis modernan tibetlingvan presejon. La librejoj en Tibeto grandnombre distribuas tibetlingvajn eldonaĵojn de aliaj lokoj de nia lando.

La distribuata nombro de la *Tibeta Ĵurnalo* plimultiĝis de malpli 2,000 ekzempleroj en 1956 ĝis la nunaj 25,000. La komunumoj kaj multaj brigadoj de la kamparo kaj paŝtejoj abonis la ĵurnalon kaj starigis studgrupon de ĵurnalo.

Ankaŭ en la amasa arta aktivado oni vaste uzas la tibetan lingvon, ekzemple en teatro, tibeta opero, kanto kaj tradukado de kinofilmoj.

La tibeta lingvo estas vaste uzata, senĉese riĉigata kaj disvolvata.

*Sur la Kovrilo:*

Laboristoj kritikas Lin Biaŭ kaj Konfucion.

*Sur la Dorskovrilo:*

Horĉin-stepo






# EL POPOLA ĈINIO 中國報道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**

**P.O.Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 11 (196) 1974**


## Ĉefa Enhavo


Miliono da nudpiedaj kuracistoj en kreskado. . . . . 1

La naskiĝloko de nudpiedaj kuracistoj. . . . . . 4

Nudpiedaj kuracistoj bonvenaj al la amasoj. . . . . 7

Batalo de la laboranta popolo kontraŭ Konfucio en la historio . . . . . . . . . . . . 9

Batalado kontraŭ sekegeco ĉe la piedo de Flama Monto 15

Komunumoj ĉe la kanalo Ruĝa Flago. . . . . . 19

Granda ŝanĝiĝo de malgranda karbominejo. . . . . 23

Nova vojo de konstruado . . . . . . . . . . 25

Baj-nacio . . . . . . . . . . . . . . . . 27

Problemo pri monda loĝantaro . . . . . . . . 30

Nova fizionomio de Gujlin . . . . . . . . . . 35

Trovo de postrestaj pecoj de "Militarto de Sun Bin". . 39


Rumana kantdanca ensemblo Maramureŝ en Ĉinio. . . 41

Birdoj kaj bestoj en Ĉinio . . . . . . . . . . 44




# Ŝtona Skulptaĵo

Petrolistoj



Hidroelektrej



世界语《中国报道》一九七四年第十一期（本刊代号：二——九一五